



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

Varianty mezinárodního jazyka

Pod tímto titulem (Variantes de le lingua internationale) rozesílá s datem 27. ledna 1948 »Mezinárodní společnost pomocného jazyka«, jak přeložila v průvodním českém dopise své anglické jméno International Auxiliary Language Association, litografovanou brožurku o 70 stranách, v níž předkládá své čtyři nové návrhy umělého pomocného jazyka a žádá adresáty, aby rozhodli, který pokládají za nejlepší. Návrhy jsou označeny písmeny P, M, C, K. Jsou do nich přeloženy krátké texty z angličtiny (o světové poštovní unii), z francouzštiny (o moderních principech trestního práva mezinárodního), z ruštiny (o faktorech proměny zemské kúry), ze španělštiny (o Francouzích v Mexiku v 19. století), z němčiny (o horečce), z italštiny (příběh o Modré jeskyni) a začátek první hlavy charty Spojených národů, k němuž jsou připojeny příslušné originální texty anglický, francouzský, ruský, španělský a překlady německý a italský. Pak následují překlady »Modlitby na Akropoli« z Renanových Souvenirs de l'enfance et de jeunesse do volapüku (1880), esperanta (1887), ida (1907), latino sine flexione (1908), esperanto-II (1910), occidentalu (1922), novialu (1928) a do čtyř variant P, M, C, K.

Ukázkové texty jsou krátké, asi 30 řádek strojem psaných.

Je předem hodno pozor, že varianty IALA rychle rostou co do počtu. Ve svém vyhlášení, jež otiskly Svobodné noviny 25. listopadu 1947 (viz stranu 119 našeho loňského ročníku) mluvila IALA o třech typech, nyní už má čtyři.

Nelze pominouti mlčením, že mezi projekty je vřaděno i »Esperanto II« z r. 1910 podle »Komplete Fundamento de l'Interlingvo Esperanto-II de Antido«, vydané v Bernu 1942. Ačkoli jeho původce René de Saussure má velké zásluhy o esperantskou odbornou terminologii a objevil pro tvoření esperantských slov princip nutných a dostačujících prvků (principo de neceso kaj sufiĉo), podle něhož musí se do slova vložit všechny potřebné složky, ale jen ty a žádné jiné, neměly jeho pozdější návrhy na reformy esperanta (Antido, Esperantido, Reform-esperanto) nikdy žádný ohlas ani u esperantistů a přirozeně ani u veřejnosti k interlingvistice lhostejné. Je tedy krajně nepravděpodobno, že

by mělo nějaký ohlas opakování jeho návrhů pod jménem Esperanto-II.

IALA byla založena roku 1924 a bylo pokládáno za velký úspěch pro myšlenku mezinárodního jazyka, že se tu sdružovali mužové, proslulí v různých oborech, zvláště v jazykozpytu, kteří většinou snahy esperantistů pravidlem neberou vůbec na vědomí. Zakladatelka společnosti, ušlechtilá a učená diletantka v mnoha oborech, pí Dave H. Morris, rozená Vanderbildt, choť amerického diplomata, která si získala finanční zásluhy o vydání »Bibliografio de Internacia Lingvo«, se však zmýlila, přeceňujíc význam autorit pro náš problém. Alexis Carrel v proslulém spise »Člověk, tvor neznámý« správně hodnotí tento omyl ptáti se slavných badatelů, na př. přírodovědeckých, na jejich mínění a hodnocení otázek, na př. mravních nebo politických. Jejich výrok nemívá tu větší platnost než výrok jiných vzdělaných lidí. Esperantisté se o tom mnohokrát přesvědčili ve vlastní při. — Předsedou IALA je Stephen Duggan, Director emeritus, Institute of International Education, předsedkyní výzkumného odboru Mrs Dave H. Morris, Vice-president World-Service Council YWCA of USA, ředitelem výzkumu Andre Martinet, Directeur d'Etudes, Ecole des Hautes Etudes, Sorbonne, asistent ředitelství výzkumu Alexander Gode. Jazykovými poradci jsou universitní profesori William E. Collinson z Liverpoolu, Albert Debrunner z Basileje, Alf Sommerfelt z Oslo, Joseph Vendryes z Paříže. Collinson je aktivní esperantista, jinak jsou to však jména mrtvá, nejen pro nás esperantisty, již nutně jsme také zakleti v okruh svého odbornictví interlingvistického, i když se pro povahu svého usilování snažíme z něho pronikati, ale jsou to jména mrtvá i pro každého, kdo není právě odborníkem z těchže oborů jako oni. Funkce universitních odborníků pro nás může spočívat jen v jejich kritice, užíváme-li nástrojů správného logického myšlení a zkušenostních dat dost dobře.

Po té stránce je existence IALA nedocentitelná a esperantisté její publikace musí pečlivě sledovat. Také jako viditelné znamení, že lingvisté, aspoň někteří z nich, už otázce mezinárodního pomocného jazyka věnují svůj poučený

zájem, nelze IALA podceňovat, ačkoli tento theoretický zájem sotva bude rozhodný pro konečné rozřešení otázky.

Velmi mnoho může IALA vykonati též ve výzkumu a kritice umělých jazyků a ovšem zvláště esperanta. Pěkný příklad takové práce je pokus, který byl na její podnět vykonán o esperantské tabulce korelativních slovcí. Je to tabulka ukazovacích, tázacích, neurčitých a záporných zájmen a příslovcí, v theorii interlingvistiky velmi kritizovaná.

Byl vykonán takto: 20 universitních studentů, z nichž nikdo neměl zvláštních znalostí ani esperanta, ani ida, učilo se 45 slovům z esperantské tabulky a jim odpovídajícím slovům idistickým (nepravdělným, ale utvořeným podle přirozených jazyků) vždy 90 minut v každém případě. Vždy deset z nich učilo se slovíčkům esperantským a deset druhých idistickým a druhý den obráceně (bylo to 4. a 5. ledna). Potom (6. ledna) byl test pro všechny studenty s tímto výsledkem: Při překladu slov do angličtiny byl průměr dobrých odpovědí 44 pro esperanto a 43 pro ido. Naproti tomu při překladu z angličtiny do esperanta a do ida byl průměr dobrých odpovědí pro esperanto 33 a pro ido jen 15,5. Zpráva uzavírá: »Esperantská soustava korelativních slovcí bývá kritizována jako umělá, příliš systematická a nesnadná; náš vlastní výzkum a osobní zkušenost přiváděly nás k téže kritice. Ale naše obsáhlejší pokusy přivedly nás k pochybám o její platnosti.« (Language Learning, a Report to IALA, Colombia University, New York, 1933.)

Naproti tomu je zřejmý omyl sestrojiti nové projekty umělých jazyků a dáti o nich hlasovati náhodným zájemcům. Předkládám ukázky z jejich návrhů.

P: Extracto de le articulo „Zemlja“ (Terra).
M: Extract del article „Zemlja“ (Terra).
C: Extracte del article „Zemlja“ (Terre).
K: Extrakto del artiklo „Zemlja“ (Tero).
E: Teksto el artikolo „Zemlja“ (Tero). Bolšaja Sovjetskaja Enciklopedija, Moskva, 1933, vol. XXVI, str. 696.)

P: Factores contribuyente ad le metamorfose de la crusta de la terra.
M: Factores contribuent al metamorfose del crusta del terra.
C: Factores contribuyente al metamorfose del crusta del terre.
K: Faktori kontribuante al metamorfose del krusto del tero.
E: Faktoroj de metamorfozo de la terkrusto.

P: Le processus géologic que continuement transforme le
M: Le processus géologic que continuement transforme le
C: Le processus géologic que continuement transforme le
K: Le procesi geologiale kel kontinuen transforme le
E: Geologiaj procesoj kontinue transformantaj

P: superficia de le terra et le structura de su crusta forma
M: superficie del terra e le structura de su crusta forma
C: superficia del terre e le structura de su cruste forma
K: superficio del tero e le strukturo de sue krusto forma
E: teran vizagon kaj strukturon de la tera krusto dividigas

P: cum respecto ad su origine, duo gruppos principale;
M: con respect a su origin, duo gruppes principal;
C: con respecte a su origine du grupes principal;
K: kon respekto a sue origino, du grupi principale;
E: laŭ sia origino je du ĉefaj grupoj:

P: processos endogene, le energias de que habe lor origine
M: processus endogene, le energias de que have lor origin
C: processus endogene, le energias de que have lor origine
K: procesi endogene, le energi de kel hava lore origino
E: procesoj endogenaj, kies energi-origino kuŝas

P: in le interiore de le terra, et processus exogene causate
M: in le interior del terra, e processus exogene causat
C: in le interior del terre e processus exogene causat
K: in le interioro del tero e procesi exogene kauzate
E: en interno de l'tero, kaj procesoj eksogenaj kondiĉataj

P: per energias proveniente de un foco exteriore, i. e. le sole.
M: per energias provenient de un foco exterior, i. e. le sol.
C: per energias proveniente de un foco exterior, i. c. le sol.
K: per energii proveniente de un foco exteriore, t. e. le helio.
E: per energioj de ekstera origino — la suno.

Český překlad z ruského textu: Faktory proměny zemské kůry. Geologické procesy, proměňující nepřetržitě tvář země i strukturu zemské kůry, rozdělují se podle svého původu na dvě hlavní skupiny: endogenní, jejichž původ leží v nitru země, a exogenní, podmínované energiemi vnějšího původu — sluncem.

Zvolil jsem náhodně tuto ruskou větu; připojil jsem esperantský překlad podle originálu, ne podle překladů IALA, jež nejsou dost doslovné.

Je na této ukázce dost dobře viděti hlavní vlastnosti variant. Společný jejich znak je rozvláčnost, těžkopádnost, podobná té, již má occidental. Aby se mohlo používatí slov výhradně v jejich románsky mezinárodní formě, užívá se opisů.

To contribute je pro ně typické stejně jako extracto, neboť faktory ve skutečnosti k proměnám nekontribuuji, nepřispívají, nýbrž je podmiňují nebo zapřičiňují a překládaný článek není výtahem, ale částí nebo textem, jak jsem si dovolil opravit v esperantském překladu.

Causate je zřejmě nesprávný překlad; »obuslovlennye« je »podmiňované«, je to už asi tři desetiletí velmi oblíbený pojem pro označení závislosti přírodních zjevů, často se tu říkává po americkém vzoru kondicionované, aby se odlišilo od tvrzení o příčinné souvislosti, o kausálním nexu.

Rusky »istočnik« je »původ, zdroj, pramen«, není dobře v překladu pro totéž slovo jednou říci origino a po druhé foko, což je asi ohnisko, esperantsky fokuso.

Záliba v dvojitych souhláskách je vidna i z této malé ukázky a z celých textů ještě více. Tato věta není zvlášť vybrána, zvolili jsme ji jen proto, že je to překlad textu ruského. Dvojité souhlásky ovšem zdůrazňují etymologii slova, ale pro Slováky a i pro příslušníky jiných národů než románských velice stěžují pravopis. Je to chyba, již se dopustil autor occidentalu E. von Wahl. Tvořil a vytvořil jazyk pro vzdělance, kteří už většinou styky a zájmy mezinárodní mají, kteří už studovali aspoň jeden románský jazyk, a to většinou na školách methodou analytickou, to jest podle gramatických pravidel, z etymologie a z mluvnice historické. Ale ti ne-

potřebují pomocného jazyka tak, jako ti, již nemají privilegium theoretických studií a přece mezinárodních styků potřebují býti přímo účastni. Nefonetičnost abecedy pokládáme za nedostatek v každém případě. Také bych rád připomenul, že Francouzi i ostatní příslušníci románských národů také dělají chyby proti dvojílosti souhlásek.

Výběr ukázkových textů ve zprávě IALA je jen zdánlivě účelný. Je velmi líbivý, neboť předstírá rozmanitost. Ve skutečnosti byly zvoleny texty pro mezinárodní jazyk aposteriorní velmi snadné, neboť jsou vesměs o themech abstraktních a při tom odborně primitivních, samé začátky pojednání, plně obecných pojmů. Obtíže vyjadřovací začínají až ve výkladu zcela odborném, který právě pro to je pln konkrétního obsahu, i když slova zůstávají odtažitá, anebo zase při themech z denního života, ale familiárních. V tom by všechny čtyři varianty zklamaly právě pro svou bezbarvou vznešenost. Nebojím se říci, že výběr těch textů je přímo demagogicky vtípný.

Ukázka překladu »Modlitby na akropoli« v 7 umělých jazycích trpí tímže obmyslným výběrem nebo překvapující neznalostí faktického stavu.

Především nebere na vědomí, že esperanto jediné z umělých jazyků není dílem jediného muže, nýbrž výtvozem kolektivním. Připojití tedy k němu 1887 jako rok jeho vzniku stejně jako k druhým velmi skresluje skutečný stav věci. Esperantský překlad z roku 1906 je krásně srozumitelný dodnes, je to do jisté míry klasické esperanto z té doby, ale dnes by překladatel leccos řekl jinak, jak pokročil vývoj esperanta naturalismem k větší slovní bohatosti, ale zároveň schematismem apriorností k větší přesnosti a k ustáleným rčením, jež přes svou stálost přece nejsou idistická.

Stůjž zde na ukázkou prvá věta z toho textu v několika překladech.

Francouzsky: Je suis né, déesse aux yeux bleus, de parents barbares, chez les Cimmériens bons et vertueux qui habitent au bord d'une mer sombre, hérissé de rochers, toujours battue par les orages.

Esperantský překlad z r. 1906: Mi estas, bluokula diino, naskita de barbaraj gepatroj, ĉe la Kimmerianoj bonkoraj kaj virtamaj, kiuj loĝas borde de maro malhela, plena de elstariĝantaj ŝtonegoj, ĉiam batata de l'fulmotondroj.

Esperantský překlad dnes: Mi naskiĝis, diino kun bluj okuloj, el barbaraj gepatroj, ĉe Kimmerianoj bonaj kaj virtaj, kiuj loĝas ĉe maro malhela sur bordo hirtigita de rokoj, ĉiam batata de tempestoj.

Latino sine flexione: Me e nasce, o Dea cum oculis caeruleo, de parentes barbaro, apud bono e virtuoso Cimmerianos, qui habita prope litore de mari obscuro, repleto de scopulos semper battuto ab tempestates.

Occidental: Yo nascet, deessa con blu oculos, de barbaric genitores, che li Kimmerianes bon e vertuosi, quel habita in li bord de un mare obscur, plen de roccas salient, sempre battet de tempestes.

IALA-varianta P: Jo habe nascite, o dea, cum oculis azure, de parentes barbare, inter le bone et virtuose

Cimmérios, que habita ad le bordo de un mare sombre ericiate de roccas et semper battite per le tempestas. (Varianta M má lo have nascit, con, oculos, azur, barbar, bon, e, virtuos, al borde, mar, erissat, battit. Varianta C má Yo ha nascet, deessa, rocas, batet, jinak se shoduje s M. Varianta K má Yo naskaba, jinak se shoduje s P, ale píše okuli a má pravopis fonetický.)

Český překlad z francouzského textu: Narodila jsem se, bohyně s modrýma očima, z rodičů barbarských, u dobrých a ctnostných Kimerianů, kteří bydlí u temného moře na břehu zježeném skalisky a stále bičovaném vichřicemi.

Zde lze se hned pozastavit nad slovem a z u r a. V esperantu je tento kmen ve tvaru la z u r a pro barvu nebeské modří, nelze se ani v esperantu, jež úmyslně je slovy chudé, vyhnouti dvěma kmenům pro modř, b l u o a pro azur l a z u r o. S e m p e r je latinské slovo snadně jen pro toho, kdo studoval latinu, v esperantu je pro vždy slovo ze slavné apriorní tabulky korelativ.

Kmen s o m b r a je s hlediska naturismu sporný, ale je velmi poučné ukázati na něm naturistickou neboli aposteriorní metodu výběru slov. Je ve více románských jazycích. Ve francouzštině je s o m b r e ve významu temný, tmavý, pošmourný, figurálně zasmušilý, zádumčivý, nedůvěřivý, zcela osamoceno. Rodina odvozenin od latinského u m b r a je bez s — o m b r e, stín, šero, chlad, chládek, figurálně nepatrná stopa, zbytek, zdání, tajnost, rouška, záminka, duše odloučená od těla. Je ho hojně použito ve rčeních: f a i r e o m b r e à q u e l q u ' u n stíniti koho, vzbuditi něčí podezření; m e t t r e q u e l q u ' u n à l ' o m b r e uvrhnouti koho do vězení; d a n s l ' o m b r e skrytě, à l ' o m b r e d e . . . pod ochranou něčí, d a n s l ' o m b r e tajně, skrytě. Velká homonimita slova ukazuje, že je ho často užíváno. A je řada odvozenin: O m b r e l l e slunečník, o m b r e r stínovati, o m b r e u x stinný, chladivý. O m b r a g e stín, ale zase figurálně podezření, o m b r a g e r stíniti, fig. zakrýti, o m b r a g e u x plachý o koních, podezřívavý o člověku, p r e n d r e o m b r a g e d e . . . urazití se pro . . . , znepokojiti se pro.

V italštině slov s předraženým s—, odpovídající francouzskému s o m b r e, není vůbec, celá rodina slov, odvozených z lat. u m b r a, je obdobná francouzské. O m b r a stín, o m b r e g g i a r e stíniti, stínovati, o m b r e l l o deštník, o m b r e l l i n o slunečník, o m b r o s i t à stín, stinnost, figurálně plachost, nedůvěřivost, o m b r o s o stinný, plachý, nedůvěřivý. O m b r a r e stínovati, o m b r a t u r a stínování.

Ve francouzštině je vedle uvedených slov ještě (u n) o m b r e lípan (ryba), v italštině o m b r e l l a okolík a o m b r e l l i f e r o okoličnatý (pro botaniku). Obojí je asi odvozeno též z původního u m b r a a je bez předsunutého s—.

V angličtině však je s o m b r e ve významu jako ve francouzštině t m a v ý a s m u t n ý. Stojí tam zcela osaměle, bez rodiny slov spolu odvozených, neboť je to tam typicky »cizí slovo« a zdá se tedy Angličanům velmi mezinárodní, ačkoli nebo právě proto, že od toho kmene mají jen ještě cizí slovo španělské s o m -

brero pro klobouk s širokou střechou; jinak je to slovo zcela osamocené. Anglické ombre (stará hra v karty) je odvozeno z latinského homo (člověk).

Je to případ zcela analogický esperantskému slovu reallerno pro reálku, jak je zavedli Němci a po nich Češi, protože se jim slovo reala zdálo mezinárodní i pro školu, v níž se neučí latině. Je to slovo v tomto významu opravdu cizí pro němčinu i češtinu a tak se snadno budí zdání, že je to význam mezinárodní, ačkoli kmen real- má mezinárodně jen význam »skutečnost, realita«. Trvalo dlouho, než z esperanta druhý význam vymizel.

Na těchto dvou příkladech se ukazuje, jak se tvoří soud o mezinárodnosti kmenů. Je viděti, že ani autoři IALA nemohli použít jiné metody než odhadu stupně mezinárodnosti a že stejně jako esperantisté podléhají vlivu svého mateřského jazyka, a že i oni se musí podrobiti zkušenosti těch, již mezinárodním jazykem opravdu píší i mluví. A tím jsou stále jen a jen esperantisté.

Také tu je viděti prospěch, jenž esperantu z prací IALA plyne, neboť není vyloučeno, že kmen ombre přejde do esperanta, v němž se už dlouho vede diskuse o nahrazování slov mal- samostatnými novými kmeny. To ukáže zkušenost.

Ale metoda, již zvolila IALA k hlasování o svých variantách, je zcela špatná. Není vůbec odborníků, již mohou posoudit účelnost a proveditelnost změn v umělém mezinárodním jazyku, mimo obec esperantistů. Posoudit vhodnost umělého jazyka nelze po přečtení mluvnic nebo několika krátkých textů.

Slavný badatel v interlingvistice Otto Jespersen, spoluautor dvou projektů umělého jazyka, řekl na druhém sjezdu lingvistů v Paříži 1933: »Není zde místa k diskusi o zásluhách nebo úhonech různých návrhů mezinárodních řečí esperanta, ida atd. Volba mezi nimi nemůže bez přípravy být vykonána náhodným prohlédnutím učebnic nebo ukázek; ty řeči jsou podobny živým bytostem, jejichž nejžádanější vlastnosti odkrýváme teprve po více letech důvěrné známosti. Otázka potřebuje dlouhé vážné zkoumání a radím je každému z vás. Mohu vás ujistit ze své vlastní zkušenosti, že časem přináší tento výzkum prospěch. Nebyl bych mohl vykonat to málo, co jsem vykonal v obecné lingvistice ani v anglické syntaxi bez svých hlubokých studií mezinárodních jazyků.« (Zprávy kongresu, str. 101, Paříž 1933.)

Hlavní omyly, jichž se IALA dopouští, jsou dva:

1. Pokládají za axiom, že umělý jazyk musí být veskrze aposteriorní, jak oni říkají naturalistický, že v něm nesmí být prvků apriorních, oni říkají schematických. Zkušenost esperanta však ukázala, že je to omyl. V esperantu prvky apriorní jsou. Ty právě mu dodávají jeho logičnost a snadnost. Je to vedle proslulé tabulky 45 korelativních slovcí aglutinující způsob tvoření

slov. Není pro ně správný termín odvozování, derivace. To byl právě omyl Couturatův a Beaufrontův, že chtěli vytvořit pravidla derivace slov podle analogie románských jazyků. Vyvrcholením tohoto hlediska je occidental, jenž sestavil důmyslná pravidla, aby pomocí 94 přípon dospěl k slovům, která se shodují s obecným románským tvarem mezinárodních slov. Zamenhof intuitivně se rozhodl slova skládati. Znaky pro části řeči —o, —a, —e, —i, i mluvnické přípony —as, —is, —os atd. teprve slova z kmenů tvoří, slovatvorné předpony a přípony jsou samy o sobě též slovním kmenem. To právě dodává esperantu jeho snadnost a kompenzuje jeho poměrnou slovní chudobu. To umožnilo, že esperanto se může samo v sobě vyvíjet a že se skutečně vyvíjí autonomně k stále větší bohatosti a přesnosti.

2. Pomocný jazyk není dosud nikým žádán. Jde o to lidstvo přesvědčiti o jeho možnosti i o jeho potřebě. Jde tu o velký úkol socialisační. Mezinárodní osobní styky mají být zpřístupněny i těm, již nejsou privilegováni. K tomu se musí lidé vychovati, o možnosti a výhodách této nové věci musí být lidé přesvědčováni stejně jako se jim musilo kázat o výhodách nemocenského a starobního pojištění a jako se musí přesvědčovat o výhodnosti plánovaného hospodářství. To je možné jen tím, že se lidstvu předkládá jen jeden už zcela hotový a poměrně velmi vyhovující umělý jazyk, jehož se k mezinárodním stykům používá hned od počátku a pro nějž se další upotřebení stále hledá a vytváří. To, že esperanto je skutečně mezinárodně rozšířeno, že není země, kde by nebylo esperantisty schopného i ochotného esperantsky mluvit a podle možnosti i sloužit těm druhým, je věc, již nelze přehlédnouti a již nelze nehodnotiti velmi vysoko.

Proto jsme rádi, my esperantisté v Československu, našemu lidově demokratickému zřízení, neboť víme, že nemůže nevidět socialisační prvek v našem usilování. A pokládáme esperantskou metodu přesvědčování o svém cíli od muže k muži za jediné možnou. Nevěříme zatím v zákroky mezinárodních institucí. Jsou dosud málo socialistické.

Dr. Stanislav Kamarýt.

*Velmi doporučujeme našim členům, aby se přihlásili za členy Československé společnosti pro mezinárodní styky, jež je Československým sdružením pro Spojené národy. Jednou z posledních výzev Jana Masaryka byla výzva k těmto přihláškám.
Adresa: Praha I, Valentinská ulice 1.*

Kiuj deziras reprezenti la »Esperanto Film-Grupon« en sia lando, bonvolu sin anonci grandnombre el ĉiuj landoj. Antwerpsestraat 45, Bergen op Zoom. (Nederlando).

Albín Neužil

Kiel ni jam sciigis en la 2-a numero, mortis en Olomouc subite la 19-an de februaro 1948 samideano Albín Neužil, unu el la plej malnovaj pioniroj de esperantista movado.

Albín Neužil naskiĝis la 16. 2. 1883 en vilaĝo Bohonice apud Brno. Fininte studojn en la Pedagogia instituto en Brno li fariĝis instruisto en popola lernejo en Znorovy apud Hodonín. En la jaro 1905 li translokiĝis en urbon Olomouc kaj instruis en kelkaj lernejoj en ĝia ĉirkaŭaĵo; depost la jaro 1919 li estis dum 20 jaroj lernejestro de popola lernejo en Neředín, antaŭurbo de Olomouc. Neužil edziĝis en 1906 kaj havis kun sia edzino Filomena 6 infanojn. Krom la vidvino vivas nun sole du: Filo Lumír, oficisto en Opava, kaj filino Dagmar, studentino en kemia fakultato de la Teknika altlernejo en Brno.

Neužil fariĝis esperantisto en la jaro 1904 kaj ekhavis tian intereson pri Esperanto, ke li dum mallonga tempo faris ekzamenon pri kapableco instrui esperanton kun eminenta sukceso; de tiu tempo li restis fidela al la movado dum sia tuta vivo kaj gajnis grandajn meritojn pri disvastigo de Esperanto en nia lando. En la jaro 1921 li faris ŝtatan ekzamenon pri kapableco instrui Esperanton en la popolaj kaj burĝaj lernejoj. Dum multaj jaroj li gvidis en la urbo Olomouc kaj ĝia ĉirkaŭaĵo ĉiujare kelkajn kursojn, tiel ke la novaj esperantistoj de Olomouc estas preskaŭ ĉiuj liaj lernantoj. Kiel lernejestro kaj bona pedagogo, li uzis sian influon en la popola lernejo kaj instruadis Esperanton al siaj ĝelernantoj, kun kiuj li poste faris ekskursojn en- kaj eksterlanden. Li vizitis entute 13 universalajn kongresojn. Tio estis jenaj: (versajne) Kraków 1912, Den Haag 1920, Praha 1921, Helsinko 1922, Nürnberg 1923, Wien 1924, Genève 1925, Edinburgo 1926, Gdansk 1927, Budapeŝto 1929, Kraków 1931, Paris 1932, Warszawa 1937. Pri la kongresoj li sciis ĉiam interese rakonti aŭ en la klubejo, aŭ per rakontado de gajaj okazintaĵoj pliagrabliĝi la lernadon al siaj kursanoj. Li havis grandan nombron da amikoj en la tuta mondo, speciale inter la ĝinstruistoj. En jaroj 1927—1929 li estis prezidanto de Tutmonda Asocio de Ĝinstruistoj Esperantistaj. Eksterlande li fervore propagandis helpe de Esperanto sian patrujon kaj ĝiajn bel-aĵojn.

Pro siaj meritoj li ricevis de la Esperantista societo en Olomouc diplomon de »Honora membro«. Dum la 29-a tutmonda kongreso en Varsovio li ricevis diplomon »de la ora jubilea stelo« por la pionira agado. Estinte multajn jarojn prezidanto de Esperantista societo en Olomouc, li estis pro siaj eminentaj meritoj en la jaro 1946 elektita ĝia unua honora prezidanto. Li estis dum longaj jaroj delegito de UEA - IEL kaj gastigis en sia hejmo ĉiujn eksterlandajn samideanojn, kiuj vizitis Olomouc (en la lasta tempo samideaninon A. Alamo kaj geedzojn Baur).

Lia propra instrumetodo, laŭ kiu li instruadis kaj edukadis infanojn en sia lernejo, fariĝis lia



tutviva laboraĵo, kiu akiris ĉe eksterlandaj pedagogoj grandan admiron. Neužil laboris ankaŭ literature kaj verkis libron »Metodo de manpreŝitaj ornamaĵoj« 1926 (ĉeĥe kaj esperante) kaj »Radostné mládí«, libron de ĉeĥaj poemetoj por la ĝejunularo. Li tradukis esperanten grandan nombron de naciaj kantoj ĉeĥaj kaj slovakaj.

En la jaro 1939 estis Neužil dum 8 tagoj arestita, pro malsano liberlasita, sed restis sub senĉesa inspekto polica.

Post la milito li kiel pensiulo helpe instruis dum unu kaj duonjaro en »Březina lernejo popola« en Olomouc. Dum lastaj du jaroj de sia vivo, kvankam ne tro sana, oferis Neužil sian tutan tempon al laboro por Esperanto kaj komencis kolekti kelkajn albumojn pri nia lando, kiujn li jam forsendis aŭ intencis sendi eksterlanden. Li komencis ankaŭ instrui Esperanton en knabina burĝa lernejo en kvartalo Úřední čtvrť. La neatendita morto interrompis ĉi tiujn kaj aliajn liajn preparitajn laborojn por la movado.

Samideano Albín Neužil, senlaca batalanto por noblaj idealoj esperantistaj, estis vere inda kavaliro de la verda stelo. Lia senlaca penado por disvastiĝo de nia kara lingvo restos por ni, kiuj promesas daŭrigi la laboron sur kampo de li forlasita, imitinda ekzemplo. Lian altstaturan personon, lian bonkoran mienon de la vizaĝo ni neniam plu ekvidos inter nia rondo, sed lia nobla animo kaj lia rememoro por ĉiam restos inter ni.

Vlastimil Blažek.

Vladimir Štědrý: Kokido por sinjoro prezidento

Tiun gloran okazintaĵon antaŭiris alveturo de du signifaj personoj. Iliaj nomoj estis portataj tra Teherano kiel spico al eterne fumantaj pladoj kun konjektoj kaj sciigoj, da kiuj estas en Oriento ĉiam tiom, kiom da politikaj intrigoj.

Kio okazas? Kio prepariĝas? Venis el Moskvo ĉeĥoslovaka ambasadoro kaj ĉeĥoslovaka ĝeneralo por iri pli longen — kien? Oni konjektadis partoprenon en la preparata konferenco en San Francisco, kiu tiam estigadis tiom da hezitoj inter persaj politikistoj. Neniu el ili povis preni kuraĝon forlasi la landon, en kiu ĉiamaj registaraj ŝanĝoj faradis pozicion, unufoje en la registaro akiritan, tiom necerta. Vi foriros kaj perdos la postenon en la kabineto. Oni konjektis ankaŭ pri nova kunveno de ĉefoj de la tri grandpotencoj, ĉion eblan kaj neeblan, sed la veron divenis neniu. Ĉeĥoslovaka ambasadoro ĉe la persa imperiestra kortego havis la buŝon sub sigelo kaj la soldata diplomatia komisiito alfoje tiom kamarada, deĵoradis malantaŭ fermita pordo. Ankoraŭ antaŭ du tagoj ili ambaŭ partoprenis en soleno de naskiĝdato de T. G. Masaryk en kinejo Akbar en Lalezar kaj subite, ambaŭ kvazaŭ transformiĝintaj, diris eĉ ne unu vorton. Sed ne estas mistero, kiu rezistus al orientala sciivolemo, al kiu fine subiĝas eĉ ĉiuj iom longe loĝantaj eŭropanoj. Tagon post alveturo de la altaj funkciuloj el Moskvo oni jam sciis, ke ili estas tie ĉi por saluti prezidenton Beneš kaj lian registaron, revenantan per ĝiganta arko el Anglujo trans Kairo, Teherano, Moskvo en urbon Koŝice.

La 14-an de marto 1945 je la duono de la kvina posttagmeze, ĵus antaŭvesperon de datreveno de la okupacio de la Respubliko, du potencaj aviadiloj alteriĝis sur la brita aerodromo.

Tiel komenciĝis la gloraj tagoj.

Noblaj gastoj veturis en silentan palacon de la ĉeĥoslovaka ambasadorejo proksime de Naderi kaj el tie post malgranda refreŝiĝo kaj eta ripozo ili disveturis en siajn loĝejojn, iuj en persan, aliaj en britan oficir-klubon, aŭ en hotelon De Park, kie loĝis de post sia alveturo ambasadoro kaj ĝeneralo.

Por prezidento kaj sinjorino Hana Beneš preparis ambasador-edzino, zorgema gastigantino, la plej belajn ĉambrojn ambasadorejajn. Ŝi antaŭvidis, kiom estos ĉiuj lacaj kaj efektive — ili estis. Sed la persona kuracisto ne permesis, ke la prezidento loĝu en la urbo. En montojn, en puran aeron, en silenton kaj kvieton! Tiel sonis lia ordono.

Kelkajn mejlojn de Teherano, ne malproksime de sia somerrestadejo en Teĝriŝ, konstruis la mortinta ŝaho Reza beleĝan, en la malproksima orientala lando nevidatan hotelon Durband. Tien foriris prezidento kun siaj plej proksimaj kaj tie ili ĉiuj ekloĝis en aerplenaj ĉambroj de la unua etaĝo.

La saman vesperon mi ekdeĵoris en la plej bela servo, kian povas iam fari soldato: malproksime de la hejmo kaj tamen inter la siaj, en persaj montoj, alte super Eŭropo mi estis destinita

al mia plej alta komandanto kiel persona gardanto.

»Dormi vi ne rajtas,« admonis min jam en ambasadorejo ministro Masaryk, al kiu nelacigebla bonhumoro helpis superforti malfacilaĵojn de la vojaĝo kaj de ĝia ne tro simpla ceremoniaro.

Estas agrable al serĝento rememori, ke unu foje, unuan kaj lastan fojon (kaj versimile unuan fojon dum armeo-ekzisto) li havis kiel sentinelestron* — kolonelon. Neniu malpli ol kolonelo, kaj krome ankoraŭ soldata diplomatia komisiito, veturigis min al mia deĵorejo. En luksa aŭtomobilo de la soldata misio mi, zonita per »colto«, veturis vespere sur ŝoseo al Teĝriŝ en provizoran sidejon prezidentan.

Mi gardis ne sole prezidenton kaj lian edzinon, sed la kompletan sekvantaron: lian oficejstron, eksterlandan ministron, personan sekretarion kaj du nevinajn de la prezidento, kiuj zorgis pri mastrumado.

Hotela servistaro estis iom surprizita per la subita vizito. La ĉambroj estis rapide adaptataj, precipe loĝejo por la prezidento. Ĝis mia alveno versimile neniu konsciigis, pri kio ja temas, kia signifoplena vizito estas alveninta el Londono. Eĉ la direktorino de la hotelo, viveca kaj vitala kvankam etkreska holandanino, komence ne sciis, kiun gastigos ruĝa tegmento de ŝia hotelo. Nur tiel povis okazi, ke la plej bona ĉambro en mezo de koridoro restis eĉ plue loĝata de edzino de persa vinisto, blondhara bela svedino, resaniĝanta tie ĉi post operacio kun sia vila, nekvieta, sed bone edukita »mopso«, kiun eĉ la ŝtata vizito ne elreliĝis el hundaj kutimoj.

Nur kiam mi estis alveturinta kun la soldata komisiito por ekokupi mian lokon kontraŭ ŝtuparo, komprenis tiuj homoj ĉirkaŭe, ke temas pri eksterordinara, historia vizito. Neniu estus min atentinta, se mi estus alveturinta kiel kutime mi alveturadis kun Marteno, soldato en brita uniformo, por teotaseto. Sed tiam ĉi mi venis armita per peza arma revolvero ĉe maldektra kokso kaj komencis laboron.

Gardi prezidenton ne estas ŝerco. Ĝi estas serioza, respondeca tasko eĉ en civilizita kaj kultura mondo kaj despli respondeca en lando, kiun ankoraŭ antaŭ la milito la germanoj rigardis kiel sian potencosferon, en lando, kie oni antaŭ ne-longe malkovris naziistan konspiron kontraŭ Churchill dum lia memorinda kunveno kun Stalin.

»Vi gardos prezidenton,« oni diris al mi kaj aldonis, ke mi bone atentu. Facile oni diras...

Gardi prezidenton malproksime en Oriento, ĵus dum lia vojaĝo al la plej gravaj traktadoj en Moskvo, ĵus dum lia historie signifa revenado en la patrujon — ĝi ne estis tasko banala kaj kutima. Dio gardu, ke io okazu al li! Nu, mi ne estis sola, kiu postenis ĉe sendanĝereco de tiu granda homo. Estis tie ĉi ankoraŭ Teherana polico. Sed mi estis tro singardema por ne ĉirkaŭrigardi mem.

* sentinelestro = zâvodĉi

Subite estis la domo plena da mi. Angulo ne restis ne trarigardita. La plej mallonga vojo al elirejoj kaj fenestroj ne restis nesignita, nemezurita, kaj ŝtupoj ne kalkulitaj pro ebleco de brulego. Se elektra lumo ekmalfunkcius, afero kutima en la persa ĉefurbo, mi havis provizon de kelkaj kandeloj kaj lanternon. Al detala kontrolo mi subigis ĉian elektran sekurilon kaj informiĝis pri ĉefa komutatora tabulo kaj ĉefa interuptoro, kie ili situas kaj kiel ili estas alireblaj. Ĉiujn tiujn sciojn mi akiris en la lasta momento, ĉar mi ne povis scii, kiom respondeca servo min atendas. Tial estis ĉie ĉio plena da mi, konscienca armilportisto, esploranta tra la hotelo de oficejoj kaj kuirejoj al manĝejoj, salonoj kaj ĉambroj super la loĝejoj de la gastoj. Nenion mi lasis al hazardo. Oni rigardis min ja kun respekto. Tiom ordeman kaj zorgeman sentinelon oni tie ĉi ankoraŭ ne havis.

Precipe al la holandanina direktorino mi imponis. Ŝi sekvis min zorgoplena.

»Vi ja ne konjektas, ke povus io okazi?« eldiris ŝi angore.

»Sinjorino, maldevas io okazi,« diris mi al tiu virino, kiu maljuniĝadis per miaj zorgoj. Ŝi havis mem da suferado sufiĉe: kion plej bonan rapide prizorgi, por ke la vespermanĝo estu digna por ŝtatĉefo, ŝia gasto. Tiel estiĝis la unua kaj lasta sangoverŝo dum tiuj du grandaj tagoj en ĉirkaŭaĵo de Teĝiriŝ. La plej bela kokido fariĝis viktimo de komprenebla direktorina ambicio, ke al la prezidento ekplaĉu en ŝia domo. Dum mia promeno tra kuirejo, ĉar mi volis persone koni la kuiristojn, al kiuj estis konfidita vespermanĝo por miaj dignoplenaj samlandanoj, mi rimarkis, kun kia zorgo preparadis la kuirĉefo vespermanĝon laŭvere ŝahan. Tiom da kurado kaj prizorgado de diversaj spicoj por tiu loga manĝaĵo... Sciante ke li bakas por »reganto«, la persa kuiristo preparadis la kokidon kun ĉiaj orientalaĵaj pacienco kaj arto. Nenie, diras la vojaĝistoj, oni scias prepari kokidon tiom perfekte kiel en Oriento. »Kokida pilafo«, tio estis onidire jam antaŭ jarmiloj frandaĵo de kalifoj. Jam praantikvaj persaj poetoj prikantis tiajn kortegajn solenmanĝojn. Kuirarto precipe en kokidfako estas onidire laŭvere tradicia, kaj talento por ilia kuirado ja hereda. Mi ne scias, el kiu gento devenis kuiristo de glora Durband, konstruita de la ŝaho mem por la plej elstaraj gastoj, sed laŭ tio, kiel li traktis la estontan delikataĵon de mia prezidento, mi estis konkludinta, ke iu el liaj malnovaj antaŭuloj kuiris kaj bakis jam en Persepoliso por Jamŝid-trono. Odoro de aromaj spicoj min ne forlasis, eĉ kiam mi revenis por sekvi aranĝojn de juna prezidenta ĉambristo por loĝigo de lia komandanto.

Kiam la prezidento alveturis, mi prezentis min laŭceremonie al li. Li akceptis mian prezenton kun la plej bela alrideto, spite ke li estis lacigita per longa vojaĝo kaj elĉerpita per subitaj ŝanĝoj de altecoj kaj de aero.

Baldaŭ poste foriris ĉiuj por vespermanĝi en salonon en teretaĝo. Ĝi estis, dirus mi, familia vespermanĝo. Ili vespermanĝis ĉiuj ĉe unu tablo

kaj sole tial, ke oni ne povis ĝin plilongigi, sidiĝis ĉambristo prezidenta kaj ĉambristino de sinjorino Hana ĉe tableto apud tapetita muro. Mi vidis ilin kontente eksidadi kaj mi revenis certa, ke ĉio estas en bona ordo, kaj ke nenio povas misfariĝi.

Ne daŭris longe kaj alrapidis la direktorino.

»Give me that gun« kriis ŝi ekscitite.

Mi eksaltis. Kio okazis? Jam mi volis kuri en la teretaĝon, kiam ŝi komencis ekscitite klarigi al mi, kia malfeliĉo alvenis.

Ĉu mi povas imagi al mi, ke tiu freneza kelnero prezentis la kokidon, tiun delikataĵon taŭgan por la ŝaho mem, al la ĉambristo, dum la eminenta gasto devis kontentiĝi kun rostajo por la ceteraj?

Holandanino kriis, furiozis, frenezis kaj daŭris tempeton, ĝis kiam mi komprenis, kiamaniere okazis, ke la tutvespera laboro de la plej bona persa kuiristo estis neniigita.

Persa kelnero (Alaho devas lin damni) ne povis al si imagi, ke registro povus vespermanĝi ĉe la sama tablo kun siaj regatoj. Aparte sidis sole ĉambristo kun ĉambristino. Ke li estis juna kaj ŝi estis juna? Ĉu ja ŝah-in-ŝah ne estas juna kaj lia imperiestrino ankaŭ? Tiuj du en sia majesta izoleco estis priservitaj unuaj. Al ili prezentis la orientala kelnero la orientalan rostajeton, buŝpecon por reĝo, rostatan kun preskaŭ laŭrita ceremoniaro kaj dotitan per ĉia plej delikata spicaro, kies sorĉo estas konata nur al la plej bonaj orientalaĵaj kuiristoj; buŝkvanto rompebla kiel matura rozo, bonodora kaj delikata kiel vespera zefiro en ŝahaj ĝardenoj.

»Donu al mi revolveron, mi forpafos tiun ulon,« vokis lamente la direktorino kun senafekta doloro en zorgoplena mieno preskaŭ eklarmante. La prezidento nek iu el lia sekvantaro neniam eksciis ion pri tiu ĉi malfeliĉo kaj vespere, kiam la domo kaj ĝiaj koridoroj mallautiĝis venis la holandanino demandi, ĉu iu ion eksciis pri tiu fiasko, ĉar la muroj havas orelojn. Nun, kiam la kolerimpeto foriĝis, la malfeliĉulino timtremis, ke ŝia kuiristo nenion aŭdu pri la sorto, kiun suferis lia delikataĵo.

Mi esperas, ke li neniam la veron esploris kaj ke la direktorino vivas ĝis nun.

Kiam la prezidento iris de la vespermanĝo neniel suspektante, de kia bonaĵo li estis senigita pro orientala logiko de persa kelnero, rimarkis la sentinelon sinjorino Hana kaj sendis al mi grandan, molan, lanugan kusenon — por ke mi pli bone fartu en la ligna apogseĝo, en kiu mi estis maldormonta ĉu noktojn en koridoro antaŭ la prezidentaj ĉambroj.

»Hodiaŭ mi ne estas devigata ion ŝlosi,« ŝi ekridetis, kiam ŝi venis rigardi, kiamaniere mi fartas, »mi havas tie ĉi soldateton.«

Afablega, atentema, ridetema sinjorino Hana. Niaj soldatoj ŝin amis.

Matene komenciĝis movado jam ĉirkaŭ la oka. Mallaŭta rapidado eniĝis en tapiŝe kovritajn koridorojn de hotelo Durband, sed kun ĝi ankaŭ eĉ tiu surpriziga elkoreco de ĉiuj, el kiuj konsistis la prezidenta sekvantaro. Kun la sincereco estis tie ĉi ankaŭ senmezura estimo kaj admiro

al la viro, sub kies antaŭvidemo kaj saĝeco de-
nove estis formata sendependa Ĉeĥoslovakio.

Kun tiu ĉi admiro kaj estimo alvenadis kaj for-
iradis vizitoj. Ministro de la imperiestra divano
venis prezenti sian omaĝon kaj inviti al la im-
periestra kortego; ambasadoro venis kun rapor-
to kaj ceremoniaro por la tago; destinita ĉef-
ministro venis por konsiliĝo; registara delegito
administranta Ŝkoda-uzinon estis akceptita de la
ministro eksterlanda.

La prezidento laboris la tutan antaŭtagmezon
en saloneto apud la dormoĉambro, dum en la
ŝaha palaco oni preparadis la solenakcepton.
Tagmeze alveturis al la hotelo luksa aŭtomobilo,
sendita de ŝaho por la noblaj gastoj.

Kun la prezidento veturis la ambasadoro, kaj
la persona gardanto devis kontentiĝi kun loko
en aŭto, kiu devis senpere sekvi prezidentan ve-
turilon. Sed en tiu vetkuro sur ŝoseo la ŝaha
Rolls Royce glate venkis. Mi veturis en la am-
basadora veturilo apud la plej malbona ŝoforo,
kiun iam la tero persa portadis. Ni atingis la pre-
zidenton nur antaŭ la marmora portalo de la re-
zidenco kaj oni diris al mi, ke mi estis unua
eksterlanda soldato, kiu venis sen invito tiom
longen.

Posttagmeze mi havis kelkajn horojn da ripozo
kaj kiam mi vespere komencis la deĵoradon,
la prezidento estis videble ripozinta kaj en bona
farto. Ĉiuj estis en la plej bona humoro dum tiu
antaŭlasta etapo de hejmen vojaĝo, ĉu la ĉiam
pri bonfarto de sia edzo zorganta sinjorino Hana,
ĉu la ĉiam korekta, serioza kaj zorganta oficej-
estro, ĉu la ĉiam akrevida, servopreta, apuda
persona sekretario. Johano Masaryk neniam
lasis neuzitan okazon por spici interparoladon
per sprito kiel ĉiam. Oni veturis hejmen — kial
ni ne devas ĝoji?

Ankaŭ la dua nokto pasis kviete kaj rapida-
do de la venanta mateno estis rapidado antaŭ
forvojaĝo.

Je la oka prezentis sin rusa oficiro. Li alveturis
kun aŭto por valizoj.

La persona sekretario disdonadis bakŝiŝojn
dum laŭtai dankadoj de ĉia servistaro. Prezi-
denta ĉambristo eliris kun filmkamero, por sur
celuloïdزونon fiksi unu pluan sidejon de la pre-
zidento.

Je la naŭa matene mi akompanis la preziden-
ton lastan fojon, tiam ĉi en la ŝaha Rolls Royce.
Sed ve, akurate antaŭ enveturo en la urbon la
malparolema, diketa ŝoforo haltigis kaj eliris.

Nun ni estas en mizerstato, mi ekpensis. Ho la
damnindaj orientalaj ŝoforoj. Jus kun mia prezi-
dento li devas havi difekton en motoro. Sed la
ŝoforo havis alian intencon. Li ne malkovris
motorkapuĉon. Li alpaŝis al eta masto sur kot-
ŝirmilo kaj singardeme li flirtigis — ĉeĥoslova-
kan flageton.

Tiel ankaŭ unufoje mi, soldateto el Praha, tra-
veturis per spaliro de parade vestitaj policanoj,
kiuj pro estimo al la alta gasto elpuŝadis siajn
ventrojn al la reĝa veturilo. Homoj konkuradis
kaj haltadis en la stratoj kaj mansvingis al ni, ĉar
sciigo pri ĉeesto de ĉeĥoslovaka prezidento jam
disvastiĝis tra la tuta urbo.

Tiam mi unuan fojon laŭdis persan ŝoforon.
Kredu, ĝi estis komplete bela scii, ke malantaŭ
mi sidas la prezidento kaj antaŭ mi libere ondu-
mas flago de la Respubliko.

Sur la rusa aviadejo kunvenis ĉiuj, kiuj en Te-
herano havis nomon kaj dignon kaj kompreneble
kompleta ĉeĥoslovaka registaro kun la plej ĉefaj
oficistoj. En ĉiuj mienoj ĝojo pro mallongiganta
vojaĝo, ĝojo pro reveno. Kaj ĉirkaŭ tiu ĉi ri-
markinda konkordo de reprezentantoj de la plej
diversaj politikaj tendencoj, ĉirkaŭ tiu ĉi mov-
ado kaj adiaŭado de ŝah-anstataŭanto, reprezen-
tante de lia registaro, oficistoj de la konsulejo
kaj ambasadorejo, kelkaj ĉeĥoslovakaj soldatoj,
ni estas tie ĉi ĉiuj eĉ kun amerikaj fotografistoj
dum tiu glora tago — en tiu lasta glora tago.

Sciante, ke la prezidento jam tuj malaperos de
miaj okuloj, mi turnis min al li jam en la aŭto por
diri al li, kiom rimarkinda kaj neesplorable estas
por mi tiu ĉi okazintaĵo.

Kiel ekridetis tiam sinjorino Hana Beneš al la
sincereco de soldato, kiu en impeto de ekscito
forĝesis, ke en ĉeesto de la plej alta komandanto
li ne rajtas paroli ion ajn.

Tri potencaj rusaj avianoj staras laŭorde frun-
ten. Rusa aviada oficiro, belega alta ulo kun bri-
lantaj epoletoj kaj medaloj soldate prezentas sin
en perlanta ruslingvo kaj akompanas la prezi-
denton ĉe revuo de honorroto. Kaj rusa muziko
ludas himnojn; kaj la suno brilas kiel neniam.

Ekiro.

Ni adiaŭas konatajn vizaĝojn, kiuj dum temp-
eto projekciis sin en printempon kaj eternan
sunon de Oriento. Mi adiaŭas ilin kiel vizion, ĉar
nenio alia ĝi ja povas esti.

La avianoj turniĝas kontraŭ vento, ekflugas
kaj akompanataj de svarmo de ĉasaviadiloj flu-
gas Moskvon.

Tri avianoj malaperas el horizonto de unu el
la plej gloraj tagoj. La kurteno de senfine blua
malpleno falis kaj nur tiam la plej bela iluzio
transformiĝis en la plej belan realon.

El la ĉeĥa libro „Kie oni kuracas nostalgion“ (1948)
tradukis S. K. — (Eldonis Eŭropa Literatura Klubo en
Praha II, Štěpánská ulice 61.)

Právě vyšel

Velký slovník esperantsko-český

od prof. J. FILIPA a K. FILIPA

446 stran, v plátně vázaný

Za 209 Kčs expeduje doporučeně ihned
po dojití této částky na účet psp. 12.371

Knihkupectví Svazu esperantistů ČSR

KRONIKO ENLANDA

Esprimon de laŭdo ricevis Slovakotour, loka grupo por fremdultrafiko en Trenčín de Direkcio por fremdultrafiko ĉe Komisiito por industrio kaj komerco en Bratislava per ĝia dekreto n-ro 1418/48 On/Tĉ el 19. III. 1948. La letero tekstas: »Ni esprimas al vi tie ĉi laŭdon pro sukcesa kaj rezultita propagando de Slovakujo helpe de esperantistaj rondetoj en fremdlando. Via laboro en tiu ĉi sfero estos kronita per sukceso videbla en sokol-festaj tagoj dum vizito de gastoj el fremdlando. — Ni petas, ke vi ankaŭ en estonteco laboru en propagando kun la sama emfazo kiel ĝis nun kaj restu inter la plej bonaj lokaj grupoj en Slovakujo.« La laborantoj en Trenčín akceptu nian gratulon.

Dudek kvin jaroj de Esperanto ĉe ĉeĥoslovaka Radio. La 18-an de majo 1923 okazis en la urbeto Kbely apud Praha la unua radiofonia provlendo de regula programo. La studio estis simpla tendo, disponigita de soldatoj. Oni elsendadis per telegraf-sendilo de la aviada servo sur ondo 1180 m, kiu estis adaptita al ĝia nova funkcio. La unua muzikprogramo estis koncerto de kantistino Topinková, kiu estis pian-akompanata de prof. Duda, muzikpedaĝogo el Kijev. La unua Esperanto-programo estis elsendita en la sama jaro de d-ro Augustin Pitlík. Ĝi estis versimile la unua programo en la mondo, elsendita en Esperanto.

La vojo, kiun la radio lasis post si depost tiu tempo, antaŭ ol ĝi atingis la hodiaŭan programvariecon kaj teknikan altnivelon, estas plena de laboro, epizodoj kaj bataloj, speciale dum la tagoj de la kontraŭgermana revolucio en Praha 1945.

La Ĉeĥoslovaka radio festos sian 25-an datrevenon per internacia radioekspozicio, en kunlaboro de »Organisation internationale de la Radiodiffusion«, laŭ decido de la pasintjara kunvido de ĉi tiu organizaĵo en Monte Carlo. Kompreneble ne temas pri entrepreno de komerca karaktero, sed pri ekspozicio studa kaj propaganda. La pliparto de la mondaj radio-kompanioj partoprenos ĝin. Ĝia tasko estos klarigi al rigardantoj la radiofunkciadon de ĉiuj flankoj. La radio estos tie prezentata kiel pozitiva kontribuo al la mondcivilizacio, kiel interligilo de la nacioj kaj simbolo de spirita komuneco ĉiunacia.

Krom ampleksa stando de la ĉeĥoslovaka Radio, la ekspozicion partoprenos ankaŭ la radiofonioj albana, brita (BBC), bulgara, finna, hungara, itala, jugoslavia, kanada, maroka, monaka kaj sovetia. Pluaj aliĝoj estas atendataj.

La ĉeĥoslovaka pavilono estos dividita je partoj teknika kaj programa. Ĝi ampleksos la komencojn de la ĉeĥoslovaka radio, la periodon ĝis la jaro 1929, la milittempon, la revolucion kaj fine la samtempan laboron. La tuta program-sistemo estos tie sinoptike prezentata. La ekspozicion partoprenos ankaŭ amatoraj elsendistoj. La atento certe koncentros sin al elsendo-studio, kiu estos lokita en vitra ujeĝo. Estos tie teknikaj laborejoj kaj studioj kaj la rigardanto

okulsekvos ĉion, kio estas la enhavo de radio-programo laŭ la flanko mekanik-teknika, ĉar li vidos ĉion, de parolisto ĝis muzika kaj alia prezentadoj. Specialaj diagramoj indikos la laboron kaj rezultojn de la Esperanto-sekcio radia, kies resonado en tridek landoj de kvar kontinentoj estas notinda. La ricevitaj korespondadoj estos altira kompletigo de la Esperanta-fako. Esperanto havas jam sufiĉe longan tradicion en la ĉeĥoslovaka radiofonio. La nombro de la efektivitaj elsendoj estas jam preskaŭ nekalkulebla. Sole en 1947 dek ĉeĥoslovakaj stacioj elsendis proksimume milfoje en la internacia lingvo.

La ekspozicio posedos propran sendstacion kun originala program-sistemo, tiel aranĝita, ke la vizitanto povos trapenetri ankaŭ la malplej konatajn delikataĵojn de la anonima radia kullisejo.

La internacia radio-ekspozicio certe donos multajn instigojn kaj spertojn al la en- kaj eksterlandaj vizitantoj. La aranĝantoj esperas, ke ankaŭ eksterlandaj artistoj, kant- kaj muzik-kolektivoj, solistoj kaj prelegantoj aliĝos por funkcii en la vitra studio. La internacia radio-organizaĵo petis jam la membroŝtatojn kontribui al internacia karaktero de la ekspozicio. Estas ankaŭ notinde, ke la eksterlandaj interesatoj ĝuos plifaciligajn ĉe la fervojo (50%) kaj aliaj trafikiloj. (jm)

Radio-Bratislava disaŭdigis la 13-an de aprilo je la 20,45—21,00 horo Zamenhof-memorfeston, dum kiu estis ankaŭ kantata la slovakaj himna kanto Kto za pravdu horí (Kiu veron ŝirmas).

Kvara artoprogramo de la Verda stacio el Praha II, Morava, České Budějovice, disaŭdigata la 5-an de aprilo je la 23,00—23,30 estis komedio Aprila babilado pri unu geedza paro, adaptita de Ant. Slanina kaj Miloš Nývlt. Reĝisoris Ant. Klimeš, ĉefrolantoj estis Leraus, Bobek, Klimeš, Švabíková. Ni laŭdu precipe la klaran kaj kompreneblan elparoladon. Aŭskulti tiujn programojn estas efektiva ĝuo. Aŭskultu kaj konfirmu al Radio en Praha la aŭdon. La venonta programo estos lundon la 3-an de majo.

Esperanto kaj katolikoj estas titolo de ĉeflingva broŝuro, verkita de prof. Jan kaj Karel Filip. (Esperanto a katolíci. Životem číslo 374. Vydal Exerciční dům ve Frýdku, 1947.) La broŝuro enhavas 32 paĝojn 11×15 cm kaj koloritan kovrilon. Aperis 10.000 ekz., kostas 3 Kčs. Ni ĉerpas el ĝi sekvan informon: Ĉefepiskopo en Praha Mons. Dro Josef Beran jam kiel direktoro de la teologia seminario en Praha subtenadis per sia favoro Esperanto-movadon kaj permesis fondi esperantistan rondeton de teologoj en la seminario. Kiam li suriris tronon de sankta Adalberto li akceptis en aparta aŭdienco reprezentanton de katolikaj esperantistoj Th. Lic. O. Mádr. Li faris tiam signifan deklaron pri utileco de Esperanto por amikiĝo de nacioj kaj li donis al la tuta internacia movado de katolikaj esperantistoj sian ĉefepiskopan benon. (Mankas en

la broŝuro bedaŭrinde dato de tiu grava manifestiĝo.) La broŝuro redonas en trafa maniero ĉiujn niajn argumentojn por Esperanto. Precipe salutinda estas la fakto, ke ĝi aperis en serio de broŝuroj, propagandantaj katolikajn vidmanierojn kaj tendencojn; ĝi estas numero 374, kiu fakto mem pravas la respektingecon de la eldonejo.

Esperanta seminario en ŬRO. La 27. II. 1948 malfermis sindikata centro ŬRO esperantan seminarion, kiu okazas ĉiun mardon kaj vendredon de la 19-a ĝis 21-a horo. Instruas kaj prelegas tie d-ro Aug. Pitlík pri historio de la ideo pri la universala lingvo, gramatikaj problemoj de Esperanto, evoluo de la lingvo Esperanto (1887—1947), esperanta literaturo kaj historio de la esperantista movado. La seminario daŭros ĝis la 11. V. 1948.

Reditelevizió stát, drah v Brně pořádalo 22.—25. února 1948 v Jihlavě, Znojmu a Brně přednášky známého plzeňského esperantisty, železničáře Josefa Pecha »Cesta do severní Afriky«. V těch-

to celkem 5 přednáškách zmínil se cestovatel Pech vždy o výhodách, které mu na jeho cestách poskytovalo esperanto. V přednáškách bude p. Pech pokračovat i u jiných ředitelství st. drah a pomáhá tak objasňovat praktické výhody esperanta pro železničáře.

Nia kunlaboranto Ota Ginz pasigis pro sia profesio tri semajnojn aprilarajn en Nederlando kaj Belgio. Li uzis ripete la okazon por kunveni kun esperantistoj, parolis al ili pri nia lando kaj invitis al ĝia vizito disdonante esperantajn presajojn de la Sokol-kongreso. Tiujn propagandilojn li enmanigis ankaŭ en ĉeĥoslovaka pavilono de la Utrechta Foiro al influhavaj vizitantoj, servante tiel efike al du aferoj, al tiu de Sokol kaj de Esperanto. Aliaj ĉeĥoslovakaj partoprenantoj de tiu vojaĝo, inter ili ankaŭ niaj oficialuloj, devis rimarki kaj kun admiro rimarkis la plej diversan subtenon, kiun ĝuis flanke de esperantistoj nederlandaj kaj belgaj tra la tuta vojaĝo samideano Ginz.

Agado de la Asocia kongreso 1948 en Praha la 17-an kaj 18-an de aprilo 1948.

Amika kunesto sabaton en salono de la Aeroklubo je la 20-a horo kunvenigis jam preskaŭ ĉiujn partoprenantojn. La teatroamatora grupo de Esperantista klubo en Praha prezentis sekvan programon:

Kanta dueto „Amo, mia amo“, Vl. Zvědělková kaj N. Konopová.

Flora deklamo de „Sonoriloj“ de Kalocsay sub gvido de Miloš Nývlt.

Unuteto kanta de slovakaj popolkantoj slovaklingve, Vl. Zvědělková.

Flora deklamfilmo „Ni eltenu“, kompilita kaj gvidita de Miloš Nývlt.

Dr. Stanislav Kamarýt prelegis pri aktualaj problemoj, el kiuj li tuŝis: Malgrandaj rezultoj de lerneja Esperanto-instruado, se ĝi okazas hazarde kaj neorganizite, el kio sekvas nepra tasko provi la Interŝtatan akordon. Malgranda esperantista intereso pri interlingvistikaj teorioj. Eksperimentoj de IALA. Provoj de occidentalistoj. El ĉio tio sekvas bezono de propagando, kiu ĉesos turni sin al unuopuloj kaj provos ataki publikan opinion grandskale.

Sekvis diskuto, kiun partoprenis: Kořínek (estas bezone studi funde la lingvon). Malík (pri partopreno en Berna diskuto pri novaj metodoj kaj formoj de demokratio kaj neŭtraleca sinteno; pri memkomprenebleco de nia pozitiva sinteno al nova situacio politika, kreita la 25-an de februaro de la dua Gottwald-registaro; fakto, ke nia Ago-komitato preskaŭ neniu el nia membraro trovis foriginda, dokumentas la progreseman tendencon de nia movado. La faman devizon de Zápotocký „laŭ malnova maniero vivi neblas“ ni sentas kiel nian devizon propran pro esenco de nia movado mem). Bároch (ankaŭ en nia klopodado nepre bezona estas planado, frekventintoj de la kursoj ofte perdiĝas, ĉar la klubaj programoj ne estas sufiĉe allogaj). Vítek (en Danujo mi vidis liston de prelegistoj, mi tre rekomendus ĝian starigon ankaŭ ĉe ni; en unu librovendejo oni antaŭ nelonge vendis dum unu monato 800 lernolibrojn, tio dokumentas amplekson de intereso pri Esperanto).

Post finita diskuto rakontis s-ino Havránková pri siaj spertoj en Nederlando dum sia 6-semajna prelegvojaĝo.

Ĉiuj ĉeestantoj ricevis la ĵus aperintan kajeron de Esperantisto slovakaj.

La tuta vespero kontentigis ĉiujn. La programon gvidis s-o Slanina.

Kongresa agado dimanĉon en granda halo de kafejo Louvre komenciĝis je la 10-a horo per muziko de la esperantista himno.

Poste Jan Langer, studanto de Aktora konservatorio, deklamis ĉeĥan Lukáš-tradukon de la „Vojo“.

Ĉeestis entute 131 delegitoj el 20 lokoj: Brno (4), Brno-Zidenice, Děčín, Doksy, Hradec Král. (4), Cheb, Chlum u Blatné, Chomutov (5), Chotěboř, Jeseník, Josefův, Karlovy Vary (2), Kladno, Kolín, Kraslice (2), Lanškroun, Liberec (4), Mladá Boleslav (2), Mnich. Hradiště, Modřany, Nová Role, Nový Bohumín, Olomouc (3), Ostrava, Pardubice, Plzeň (4), Podmokly (4), Praha (60), Prostějov, Přelouč, Sezimovo Ústí, Tábor, Turč. Sv. Martin, Turnov (2), Uher. Hradiště, Ústí n. L. (4), Vrútky, Zdice, Zlonice.

La prezidanto Adolf Malík malfermas la agadon. Li salutas la ĉeestantojn kaj konstatas, ke venis reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj regionoj. Ni esperantistoj estis ĉiam tie, kie estas progreso, programo portata de popolo kaj kreata por popolo. Tial estas por ni sendisputa afero plej intense kaj plej sincere sekvi linion de la nova Klement Gottwald-registaro. Al demando ĉu ĝangalo aŭ justeco ni ĉiam respondas justeco! La principoj, deklaritaj antaŭ semajno en la kongreso de la Nacia kulturo, estas kaj estis ĉiam ankaŭ niaj principoj. Kvankam ni ankoraŭ ne estis en tiu kongreso, ni certe baldaŭ estos eniĝitaj en popolan kulturorganizon per tiu kongreso kreitan. Ankaŭ en nia Asocio estis starigita Ago-komitato. Estas nia fiero povi konstati, ke ĝi preskaŭ ne trovis elementojn, kiuj meritis esti forigitaj. Nia fiero estas ankaŭ la laŭdo, kiun ni ricevis pro nia agado en la Radio-disaŭdigado.

La prezidanto poste rememorigis mortintan ministrinon de eksterlandaj aferoj d-ron Jan Masaryk kaj mortintajn membrojn de la Asocio. La kongresanoj honorigis ilian rememoron per duminuta silento.

Por Slovaka Esperanto-Societo diris saluton MUDr. Ludovít Izák:

Estimataj gesamideanoj, karaj ĉeĥaj gefratoj! Akceptu la plej koran saluton kaj la plej sinceran bondeziron de la estraro de la Slovaka Esperanto Societo en Bratislava, de ĝia organiza fako en Turč. Sv. Martin kaj de la Slovaka Esperanto-Instituto, same en Turč. Sv. Martin. — Ni dankas por via afabla invito, kiu nin surprizis. Jes, surprizis nin, ĉar — verdire — ni volis surprizi vin, ĉar la estrara kunsido de SES, okazinta la 29-an de februaro en Bratislava, decidis elsendi kvarmembran oficialan delegacion al via ĝenerala kunveno por preparoli, pritrakti kaj definitive (?) ordigi niajn komunajn organizajn kaj laborajn problemojn. Bedaŭrinde, kvankam nia gazeto Esperantisto slovakaj en sia lasta ĉefartikolo predikas „ne restu sola!“, mi tamen restis sola. Samideano Rosa, nia prezidanto kaj ora oratoro, kuŝas en malsanulejo, samideano Jukl pro tre egaj malfacilaĵoj ne povis partopreni kaj s-ano Tvarožek estis devigita entrepreni oficialan vojaĝon en Slovakio. — Sed tio ne gravas. Tute

ne gravas, ĉu hodiaŭ partoprenas unu aŭ kvar delegitoj. La ĉefa kaj la plej signifa afero estas, ke ambaŭflanke montriĝas samtempa komuna bona volo por vera, sincera kaj oferema interkompreniĝo kaj kunfandiĝo de la ĉeĥa kaj slovaka samideanaro en la ĉeĥoslovaka kaj monda Esperanto movado. — Mi jam hieraŭ vespere traktis kun via prezidantaro pri punktoj de programo de nia kunlaborado. Mi estas konvinkita, ke ni nian rilaton organizan aranĝos amike en tendenco de la nova epoko por ambaŭflanka kontenteco tiel, ke nia kunlaboro povu komenci ne morgaŭ sed hodiaŭ. Vi volas, ke EAĈSR estu tutŝtata organizaĵo. La samon volas ankaŭ ni. Temas, kiamaniere veni al tio. Vi rigardas SES kiel ion, kio eliĝas el organiza kadro, kiel vidigon de iu dureleco. Ni slovake rigardas la EAĈSR kiel organizaĵon kun titolo tutŝtata, sed kun amplekso sole sur Bohemio, Moravio, Silezio. Nu, sed ankaŭ ni volas, ke EAĈSR estu ankaŭ fakte sur la tuta lando kaj ni intencas, ke ĝia slovaka komponanto estu SES kaj ke en EAĈSR kiel ĉapa organizaĵo estu — ni diru ia Ĉeĥa Esperanto-Societo aŭ kiel vi volas tion nomi — kiel faktoro respondanta al SES, kaj ke estu kreita komuna centra komitato de EAĈSR, en kiu estus delegitoj por aferoj komunaj, tutŝtataj, kaj fremdlandaj. Ĉe tio SES ne volas nek povas rezigni pri tenado kaj kulturado de siaj propraj kontaktoj internaciaj kun eksterlando, kiam temas pri propagando de Slovakio kaj pri aferoj aparte slovakaj. Tion ni volas fari ankaŭ dum reciproka kompreno. — Vivu Esperanto, vivu Ĉeĥoslovakio, vivu efika kaj sincera poresperanta kunlaboro de la ĉeĥa kaj slovaka samideanaro! (Aplaŭdego.)

Por Centra Estraro de Sindikatoj (ŬRO) diris saluton Frant. Stanĉk: Ni atenteme sekvas vian laboradon. Esperanto ne sole restas en programo de niaj Laborlernejoj, sed ni ĵus starigis Esperanto-sekciojn ĉe niaj kluboj en la entreprenoj. Ni konsentas kun vi, ke problemo de internacia lingvo povas esti solvata per unuanima decido kaj propono de unusola lingvo. Ni malakceptas frakciecon en ĉiu fako. Tial ni ankaŭ malakceptis proponon enmeti en niajn lernejojn occidentalon. Frakcieco ĉiam marŝas al ĥaoso. Tial ni subtenas sole Esperanton, ĉar ĝi donas al laboristo tujan profiton, ebligante al li tuj eniri en kontakton kun kamaradoj alilingvaj. Mi ŝatas, ke via prezidanto proklamis politikecon de via movado. Jes, ĉiu movado, se ĝi devas akiri siajn celojn, nepre devas plenumadi siajn taskojn politikajn. Vi ilin plenumas informante fremdlandon pri tendencoj kaj ideoj de nia registaro, kiel ĝi efektivas la veran demokration. Via movado estas kultura, klopodu, ke vi estu enigita en kulturaln komisionon de la Centra Ago-komitato ĉe la Nacia Fronto! Klopodu, ke via organizo estu efektive unueca, por tio laboru ankaŭ imperitive!

Lad. Tůma, redaktoro de „Stráž severu“ en Liberec, rekomendas al siaj kolegoj-redaktoroj tiom da kompreno por Esperanto, kiom da ĝi havas redaktorojn en norda parto de la lando.

Instruisto en ĉeĥaj lernejoj en Argentino, vivinta tie dek jarojn, Miloš Brunclik, prezentas salutojn de argentinaj esperantistoj kaj raportas pri respektantoj, kiujn nia nacio en Argentino havas. Por regionoj diris la salutojn ĉeestantaj regionaj perantoj: Praha (Jar. Sustr), Kladno (B. Vlĉková), Plzeň (Fr. Kavan), Ĉeb-Karl. Vary (Fr. Patera), Ŭstí n. Lab. (Jar. Dušek), Liberec (T. Novotný), Hradec Králové (Fr. Pytloun), Pardubice (J. Nálevka), Tábor kaj Ĉeské Budějovice (Ing. L. Krajic), Brno (J. Friedrich), Ostrava (Vlad. Slaný).

Ĉeestanta franca samideano G. Dumont salutis la kongreson en nomo de francaj esperantistoj.

En nomo de jugoslavaj esperantistoj salutis la kunvenon s-o J. Ditrich.

Salutleterojn, tre multajn, legis la prezidanto. Il estis multe aplaŭdataj.

Poste proponis la prezidanto sendi saluttelegramojn al sinjoro prezidento de la Respubliko, al ĉefministro Klement Gottwald kaj al Estraro de la Nacia Fronto. Akceptita kun brua aplaŭdo.

La telegramoj tekstis:

Al sinjoro prezidento Dro Edv. Beneš: Al pioniro de la tutmonda paco kaj de kunlaboro inter la nacioj sendas elkoran saluton regula kongreso de EAĈSR.

Al sinjoro ĉefministro Klement Gottwald: Ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj, kunvenintaj en sia kongreso, certigas Vin pri sia pozitiva sinteno al Via programo kaj promesas pluan unuaniman kunlaboron por la Respubliko.

Al Centra Ago-Komitato de la Nacia Fronto: Efektivigante kun slovakaj fratoj naciajn fronton ankaŭ en nia movado ni salutas Vin el regula kongreso esperantista.

1. **Protokolo pri la lasta kongreso** ne estis laŭlegita, ĉar la kunveno konsentis aprobi ĝin tiel, kiel ĝi aperis sur paĝo 26 en „Esperantista“ el j. 1947.

2. **Raporto pri la agado.** Ĉar ĝi aperis presita en la 3-a numero de nia organo, ĉiuj konsentis, ke ĝi ne estu legita sed ke tuj komenciĝu diskuto pri koncernaj alineoj. La diskuton gvidis vicprezidanto dr. Stanislav Kamarýt.

a) **Administrado.** Vicprezidanto dr. St. Kamarýt atentigas pri nombro de komitataj kunvenoj (13) kaj pri temporaba funkcio gvidi ilin kaj prepari ilin. Li dankas precipe al vicprez. Hromada pro tiu laboro. Li prezentas al la kunveno samideanon Balda, kiu konsentis akcepti funkcion de Asocia oficisto, dankas lin pro tiu decido kaj deziras al lia laboro bonan sukceson. (Aplaŭdoj sinceraj.) Josef Friedrich esprimas dankon al familio Hromada, kiu dum monatoj disponigis ne sole siajn laborkapablojn, sed ankaŭ siajn loĝejon al administraj laboroj kaj por deponaĵo de Asociaj materialoj, kaj al s-o Frant. Slavík, kiu tiom ofereme kaj zorgoplene plenumas funkcion de honora oficejestro de nia administrado. (Aplaŭdoj.)

b) **Regionaj perantoj.** Por vakantaj lokoj estas serĉataj taŭgaj laborantoj. Ne estas nepre necese, ke peranto loĝu en sidejo de la regiono, li povas loĝi ankaŭ en alia loko. Ĉar s-o Nálevka verŝajne transloĝiĝos el Pardubice, la funkcio estos proponita al s-ino Grossmanová en Lázně Bohdaneč. S-o Ing. Krajic funkcios provizore ankoraŭ kiel peranto en Tábor; lia transloĝiĝo al Ĉeské Budějovice signifos certe gravan revivigon de organiza vivo en tiu ĉi grava urbo, kie ĝis nun la nombro de organizitaj esperantistoj ne respondis al graveco de la urbo. Por la XVI. regiono (Jihlava) ni provos turni nin al samideano Karel Mach. Pri la XVIII. regiono (Ostrava) raportas Vl. Slaný. Nun li gvidas tie 7 kursojn kaj en la lasta tempo li akiris 34 abonantojn de „Esperantista“. Krome estas aparta kurso por fervojistoj en Bohumin. Dr. Kamarýt dankas lin pro lia daŭra sukcesa laboro kaj aludas kelkajn neregulaĵojn organizaĵajn en Ostrava-regiono. Ni ne plu povas toleri frakciecon ie ajn. Precipe nuna tendenco politika postulas de ni klopodon pri nepra unuecigo ankaŭ de nia movado. La regionaj perantoj meritas apartan dankon, precipe tial, ĉar ilia laboro ofte estas pionira.

c) **Lokaj grupoj.** Vicprezidanto Hromada raportas pri stato de lokaj grupoj. Malgraŭ nia averto ne ĉiuj kreis Ago-komitatojn nek sendis informon pri sia agado ĝis 15. IV. al Centra Ago-komitato de Nacia Fronto. Tiuj verŝajne ne povos plu funkcii, sed ili povos anonci sin denove kiel niaj lokaj grupoj. Prof. Kožený proponas, ke ni nun ne toleru klubojn, kiuj ne estas niaj grupoj laŭstatute aŭ korporacie aliĝintaj, kaj ke ni pro tio kontaktu kun la ŬAV NF. Aprobata kun aplaŭdo.

S-o Dryák el Letecké závody en Jímonice pledas por starigo de perantoj en fabrikoj. Li havas en sia fabriko jam promesajn rezultojn. Li ne aŭdis ankoraŭ pri la E-sekcioj, pri kiuj hodiaŭ parolis reprezentanto de ŬRO. Rud. Hromada atentigas, ke iniciato de ŬRO estas nova, kaj trovas iniciaton de s-o Dryák sekvida. S-o Patera kontraŭe pensas, ke ĉio dependas de ĉeesto kaj de aktiveco de esperantisto en la entrepreno, li mem akiris en la fabriko jam intereson, kvankam li posedas neniun komision. La komitato studos tiujn eblecojn kaj kontaktojn pri tio kun ŬRO.

d) **Eldonado de „Esperantista“.** Redaktoro de nia organo dankas al samideano František Milek, kiu kompostas nian revuon en librepresejo Cíl en Karlovy Vary pro la tre bona laboro kaj plenumado de redakciaj postuloj. Ankaŭ la presejo mem meritas dankon, la fakturoj respondas al la prezoj ne tro altaj. (Aplaŭdo.)

e) **Somera E-lernejo en Doksy.** Dr. Kamarýt dankas al gvidantoj de tiu tre utila entrepreno, precipe al direktoro Dr. A. Pitlík, sekretario K. Šolc, Václav Špůr, administranta la aferojn en Doksy kaj Ant. Slanina, prizorganta la amuzan kaj distran fakon. (Aplaŭdo.)

f) Memorando, prezentita al sinjoro prezidento de la Respubliko kaj dissendita al la deputitoj, estis tre grava afero propaganda; apartan dankon pro tiu laboro akceptu s-o Kilian.

g) Radio. Dr. Kamarýt dankas al ĉiuj laborantoj en tiu ĉi sfero pro ilia sindediĉo al la afero. (Apláudo.) Li proponas, ke la kongreso esprimu dankon al la Radio-direkcio pro ĝia saĝa uzo de Esperanto. Akceptita ĉiesvoĉe.

h) Gazetara servo. Ĝi ne estas ankoraŭ plene starigita. Temas precipe pri verkado de taŭgaj artikoloj, kiuj estos dissendataj al kunlaborantoj por proponadi ilin al redakcioj. Tiu servo povus bone esti ekster la ĉefurbo, sed nepe en iu klubo, kie oni sufiĉe legas. Dr. Kamarýt demandas, ĉu klubo en Brno volus akcepti tiun taskon. S-o Friedrich respondas, ke la klubo konsiliĝos kaj sciigos tion al la komitato.

3. Raporto pri la kaso ne estis laŭtlegita, ĉar ankau ĝi estis publikigita en nia organo. Ĝi vidigas grandan kreskon de nia spezo. La libro-servo estas kontata aparte. Pri ĝi meritas apartan dankon krom Slavik kaj Jiří Hromada s-o Ota Ginz, kiu precipe persekutas aferon de nia librovendista koncesio. Pro tio li akceptu apartan dankon.

4. Raporto de la revizoroj. Fr. Buhr en nomo de la Kontrola komisiono deklaras, ke li kun s-ino B. Řeháčková kaj Dr. A. Pitlík esploris la kontlibron Asocian kaj komparis ĝin kun dokumentoj. Ili trovis la kalkulojn kaj la kontojn en tre bona ordo kaj interrespondon de enskriboj kaj dokumentoj. Ili dankas al la librotenisto s-o Jiří Hromada kaj al kasistino H. Nováková pro tre bona laboro kaj rekomendas al la kongreso la aprobon de la finkalkuloj pri la j. 1947.

Poste la raportoj pri la agado kaj pri la kaso estis aprobitaj ĉiesvoĉe.

5. Ŝanĝo de la statuto. Ĉar krom la regiona peranto el Pardubice neniu proponas traktadon pri ŝanĝo, la prezidanto ne malfermos pri ĝi diskuton. Fr. Kavan havas kelkajn proponojn pri detaloj, sed konsentas ankau kun prokrasto, ĝis kiam estos akceptita nia konstitucio por povi poste adapti statuton al novaj normoj.

6. Elektioj. Vicprezidanto Hromada sciigas, ke per lotumado eliras el la komitato s-oj Tvarožek, Jiří Hromada, A. Slanina, per ekŝiĝo B. Paleček. La komitato proponas elekti s-ojn Ing. Krajíc, direktoron Al. Šikl, Jiří Hromada, Ant. Slanina. La listo de vickomitatoj restu sensanĝe. Akceptita ĉiesvoĉe.

La esperantista klubo en Praha sendos pluajn 3 membrojn, la klubo en Brno unu membron (laŭ la statuto por ĉiu finita cento da membroj). Samideanaj kluboj estas petataj tuj sendi la nomojn de siaj delegitoj, por ke baldaŭ povu aperi kompleta listo de komitato kaj komisionoj.

La prezidanto sciigas, ke hieraŭ li kaj la vicprezidantoj traktis kun ĉeestanta D-ro L. Izák pri eblecoj de pli intima kunlaborado aŭ kunfandiĝo kun slovakaj esperantistoj. Li petas d-ron Izák, ke Slovaka Esperanto-Societo sendu 3-4 pluajn membrojn en nian centran komitaton. Komuna laborado pri detalaj problemoj eble helpos sur vojo por kunfandiĝo. Ni provos dum la jaro kunvoki centran komitaton en lokon pli proksiman al slovakoj kaj tie ni provos definitive veni al solvo akceptebla por ĉiuj. Aprobata ĉiesvoĉe.

Por Kontrola komitato proponas Rud. Hromada s-ojn Buhr, Řeháčková kaj Špúr kiel membrojn, s-ojn Král kaj Mířová kiel vicmembrojn. Akceptita ĉiesvoĉe.

7. Liberaj proponoj legitaj de vicprezidanto Hromada.
a) klubo en Liberec proponas, ke la venonta kongreso okazu en Liberec; ĝi estus je la 30-a datreveno de klubfondo en tiu urbo. Akceptita ĉiesvoĉe.

b) Aranĝi propagandajn semajnojn ĉiujare en septembro (Karel Janouš en Ostrava). Rekomendita al la komitato.

c) Klopodi, ke ĉiuj lokaj kluboj fariĝu korporacie aliĝintaj Asociaj grupoj lokaj (Ing. Krajíc). Rekomendita al la komitato ĉiesvoĉe.

d) Kunigi organojn nian kaj tiun de SES (grupo en Tanvald). Opinioj pri tio povas esti tre diversaj. La komitato traktos pri la afero taŭgatempe.

e) Pri agado de la klubo en Hradec Králové ĝia prezidanto J. Vítek deklaras, ke ĉiuj agoj de

la klubo estas gvidataj per intenco helpi al nia afero; sole tiel oni devas rigardi ankau la aferojn, kiuj estis tie aŭ tie kritikataj.

f) Aŭtobuskaravanoj al Malmö kaj Budapeŝt. S-o Pytloun sciigas, ke al Malmö estas ankoraŭ du lokoj liberaj, al Budapeŝt 10 (por fervojistoj).

g) La prezidanto klarigas kialojn, kiuj gvidis lin al subskribo de la rezolucio de la oknaciaj Asocioj en Bern. Li vidas, ke li bone antaŭvidis la evoluon. Li petas la kongreson baloti, ĉu ĝi aprobas tiaman lian decidon. Ĉiesvoĉe aprobata.

h) Klopodi, ke la decido pri instruado de Esperanto en komercaj lernejoj estu reviziita. (Loka grupo Chomutov.) Aprobata.

i) Estu kreita centra komitato de ĉiuj komponentoj de nia movado — ankau katolikoj, laboristoj ktp. (Loka grupo Josefov.) Transdonita al la agokomitato.

La prezidanto rememorigas niajn sukcesojn en diversaj sferoj, precipe tiujn en la Radiodisaŭdigo kaj kun danko al ĉiuj partoprenintoj li finas la kongreson.

Estas ludata ĉeĥoslovaka himno. La kongreso finiĝis je la 13-a horo.

Protokolis A. Tarantíková.

Prezidis A. Malík.

KORESPONDI DEZIRAS

F-ino Annemarie Grosslercher, Saalfelden 78, Aŭstrio, dez. koresp. kun junaj gesamideanoj ĉeĥoslovakaj.

27-jara ĉarpentisto Ivan Novev Minev, vilaĝo Opolčec, Ĉirpansko, Bulgario.

Hristo Bošnjakov, str. Sv. Ivan Rilski 37, Sofia, Bulgario. Naĉo Dimitrov, fotografisto, selo Baniska 83, Belensko, Bulgario.

H. van Vliet, Donckersloot 10, Alblasserdam, Nederlando, dez. intŝ. poŝtmarkojn.

38 gestudentoj-dentistoj jugoslavaj dez. korespondi kun samid. ĉeĥoslovakaj pri ĉio, precipe pri dentistaj aferoj kaj medicino. Studentoj kaj dentistoj kontaktiĝu kun ni! Respondo garantiata. Skribu al: Branko Grbac, str. Gundulić 15/II, Zagreb, Jugoslavio.

Du samideanoj interesiĝantaj pri serioza pm-intŝ.:

Jakob Izrailev, Proletarskij pereulok, d. 4, kv. 10, Leningrad 25.

Jurij Aleksandrov, pr. Benua 1, korp. 102, kv. 57, Leningrad 118.

16-jara Vadim Zubkov, str. Vosstania, d. 53, kv. 25, Leningrad 14, serĉas samaĝajn gekorespondantojn.

K-doj Aksel kaj Syromjatnikov el Leningrad dankas por la amase venintaj leteroj de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. K-do Syromjatnikov respondos laŭpove, sed oni ne bonvolu daŭrigi la korespondadon. K-do Aksel transloĝiĝis al Siberio. Ili ambaŭ sendas plej amikajn salutojn al ĉeĥoslovakaj samideanoj.

Georg Petz, Radegunderstr. 26, Graz-Andritz, Aŭstrio, havas tro multajn korespondantojn el nia lando kaj ne sukcesos respondi ĉiujn.

Dragutin Križanec, Koturaška 61, Zagreb, Jugoslavio, volas korespondi kun stud. kaj dentistoj pri radiofonio, dez. kinofilmon 16 mm.

Hovóĉíme esperantsky

od JULIE ŠUPICHOVÉ.

Vhodná pomůcka zejména pro absolventy kursů. — Rozhovory o nejrůznějších věcech denního života v souběžných textech českých a esperantských.

125 stran, 28 Kčs (+ poštovné Kčs 2.50). Vřele doporučujeme! — Naše Libroservo expeduje ihned, zašlete-li příslušnou částku na účet Svazu č. 12.371 (p. sp. Praha).

LINGVO

Překlad 15. textu

Foje¹ mi legis en ia utopia verko pri tera² paradizo, en kiu eĉ ĉiuj fruktoj de spirito³ estis senpagaj,⁴ kie por la ĝuo de⁵ muziko kaj de poemo kaj de romano kaj de teatro kaj de bildo kaj de ĉiu alia arto oni neniam pagis,⁶ kie ankaŭ tiuj ĉi ĝuoj apartenis al la donacoj, per kiuj, ekzemple, abunde nin superŝutas⁷ la dia suno aŭ la sana aero. Ankaŭ ĉia arto⁸ venadis iel⁹ el la universo, ĝi fluis¹⁰ al la okuloj kaj oreloj el radio- kaj televido-aparatoj tiel,¹¹ ke neniu devis pagi¹² por koncerto,¹³ nek por filmo, nek por kolekto de lirikaĵoj, de rakontoj¹⁴ aŭ alia libro. — Nu do, homo, mi diris al mi, ĉu vi tie estus feliĉa? Ĉu vere¹⁵ nenio plu mankus al via feliĉo? — Ho jes, mankus, kaj precipe mankus al vi, kredu, la libro.¹⁶ Havi libron hejme,¹⁷ kalkuli ĝin al la objektoj, kun kiuj vi fariĝis intima kiel kun la plej amataj homoj, esti kun ĝi sola, serĉi ĝian sekreton, migri¹⁸ en ĝi kaj senti lumon el malproksimo, reveni kaj denove sin okupi pri bela vorto, bela frazo aŭ sole pri ritmo de tiu frazo, tio estas frukto de la kvietaj amikecoj¹⁹ en la kvar muroj, kie, kun la libroj, trovas lokon la tuta mondo, la tutaj epokoj. La mondo sen limoj, kaj la epokoj sen limoj.

Poznámky k 15. překladu

¹ iam; ² surtera, nikoli posttera; ³ spiritalfruktoj; ⁴ k podstatnému jménu se může vztahovat pouze jméno přídavné, tedy: la fruktoj estis senpagaj. Reknete-li „la fruktoj estis senpage“, citi každý, že za slovesem „senpage“ chybi přídavné jméno, tímto příslovcem „senpage“ určené, na př. senpage haveblaj; ⁵ viz Plena vortaro: la ĝuado de l'junaj jaroj; retrovi la ĝuadon de la libereco. Tedy ne: ĝuo el...; ⁶ oni tute neniam pagis; ⁷ per kiuj riĉe (malavare) nin pridonacas; ⁸ ankaŭ ĉiuj artoj; ⁹ iamaniere; ¹⁰ torentis; ¹¹ místo tiel ke též: sekve de kio neniu devis pagi; ¹² estis devigata pagi; ¹³ před slovy „por koncerto“ nemůže býti „nek“, poněvadž jeden zápor je již ve slově „neniu“. Kdyby věta „neniu devis pagi“ končila na př.

NI LEGIS

Pri occidental diras Dr. W. J. A. Manders en sia eminenta verko nederlandlingva „Kvin artlingvoj“: Von Wahl destinis ĝin nur por tiuj, kiuj efektive jam okupas sin pri internaciaj rilatoj, t. e. nur por tiuj, kiuj jam faris altajn studojn kaj konas almenaŭ unu romidan lingvon. Tiu opinio estas funda eraro. Tiuj kulturitaj homoj estas ĝuste tiuj, kiuj malplej bezonas ilon por internaciaj rilatoj, ĉar ili jam posedas por tio la lernitajn naciajn lingvojn. La ekzemplo de Esperanto montras, ke artefarita lingvo disvastiĝas precipe inter homoj, kiuj havas preskaŭ nenan scion pri fremdaj lingvoj, kaj kiuj ĝuste uzas Esperanton por orienti sin sur la tereno de internaciaj rilatoj. Krome ne estas ĝusta opinio, ke la lingvo internacia disvastiĝos nur en la landoj anglalingvaj kaj romidlingvaj, pri kiuj precipe interesiĝas la internacia trafiko: eĉ se ne paroli pri la granda disvastiĝo de Esperanto en iama Rusio, en la antaŭhitleraj Germanio, oni scias, ke ĝi trovis la plej favoran grundon en la malgrandaj nacioj de la centra aŭ orienta Eŭropo, kaj ekster Eŭropo, en la malproksima Nipono. Oni cetere povas rimarki, ke, se Esp-o pro sia strukturo mallogas la intelektulojn, Ido, kiu ekzistas nun jam de 40 jaroj, estas pli laŭdata ol lernata de tiuj samaj intelektuloj, kiuj favoris ĝian naskiĝon, kaj ke Occidental en siaj 25 jaroj da ekzisto estas almenaŭ liverinta la pruvon, ke la intelektuloj ne sentas urĝan bezonon de lingvo internacia. Dua malavantaĝo de tiu lingvo estas ĝia vortfarado: von Wahl rigardis kiel plej grandan superecon de Occidental, ke ĝi entenas nenan aprioran elementon. Ĝiaj afiksoj estas elektitaj malpli por

dvojtečkou, pak by výpočet věcí: ani za koncert, ani za film, ani za sbírku... mohl být: nek por koncerto, nek por filmo, nek por kolekto...; ¹⁴ de rakontoj, poněvadž v textu je (za sbírku) povidek; ¹⁵ efektive; ¹⁶ biblioteko, libraro; ¹⁷ ne: ĉe la domo = u domu; ¹⁸ vagi; nikoli erari, poněvadž zde nelze slovu „bloudit“ rozumět ve smyslu chybného chození; ¹⁹ kamaradeco.

Překlad zaslalo opět 20 čtenářů. Jsou to: J. Brett-schneider, Olomouc; Jar. Čížek, Praha; Ant. Har-na, Šternberk, Mor.; Ant. Hladík, Kostelec n. L.; Ant. Jandík, Pardubice; Št. Jelínková, Praha; Lud. Kavková, Přerov; Frant. Kuba, Olomouc; Ing. Jos. Kochman, Praha; Alois Košťál, Teplice-Trnovany; Václav Kotrba, Teplice-Trnovany; Alfred Macek, Pulgáry; Julius Procházka, Rajhrad; J. Přehnilová, Olomouc; E. Rudolfová, Trutnov; Antonie Schöblová, Beroun; S. Valešová, Turnov; M. Wadasová, Hradec Kr.; Jan Zdvihal, Týnec n. S.

Většina překladatelů vyhovovala bezvadně. Losem byl vybrán p. Jar. Čížek, Praha, kterému zasiláme knížku. Ostatním děkujeme za spolupráci a těšíme se, že vytrvají. Hm.

Slovník,

který vychází jako příloha našeho časopisu, není a nemůže být úplný. Snažíme se však, aby v něm byla slova nejužívanější všechna.

Máme k Vám dnes prosbu. Poznamenávejte si slova, která jste při překládání jakýchkoli textů potřebovali a ve slovníku našem nenašli. Napište nám je příležitostně na korespondenčním lístku (nejlépe ve větě nebo v obratu).

Rozumějte nám dobře: Nejde o zaslání všech chybějících slov, nýbrž pouze o ta slova, jež vám chyběla při používání esperanta slovem nebo písmem.

Rovněž jakékoliv jiné poznámky ke slovníku budou nám vítány. Hm.

Pro nával jiné látky byla — s ohledem na odměřený papír — vynechána slovníková příloha. Bude příložena příště. Prosíme odběratele a členy, kteří si slovníkovou přílohu nepředplatili, aby nám ji laskavě vrátili. Děkujeme.

konstrui memstarajn kunmetaĵojn, ol por rekonstrui la jam ekzistantajn internaciajn vortojn de romida deveno. Oni povas admiri, ke li reduktis la vortfaradon de la romidaj lingvoj en tiel relative simplajn regulojn. Sed, kiel ajn inĝenia estas tia sistemo, ĝi havas malgrandan praktikan valoron. Dum en Esperanto aŭ Ido oni povas kombini la lingvajn elementojn libere, tio estas neeble en Occidental. Ĉiu kunmetaĵo, kiu ne respondas al formo uzata en la romidaj lingvoj, estas tie malpermesata. Se oni zorgas nur pri la propra signifo de la afiksoj kaj prefiksoj, oni ne eviteble estas alkondukata al kreado de vortoj kiaj „Militariato, affabilerie, esperore, povrificar, capitalario, liberie, mortantie, commensation“ ktp.; kiuj, kvankam teorie korektaj, tamen estas eraraj, ĉar la tradicio de la romidaj lingvoj trudas la uzon de aliaj signifaj afiksoj („militarism, afabilita, esperantie, apovrir, capitalist, liberta, mortalita, commensament“ ktp.). Tiu, kiu ne konas romidan lingvon, devas do lerni ĉiujn tiujn kunmetaĵojn kiel simplajn vortojn. Vere estas aliflanke, ke tiu, kiu konas romidan lingvon, povas unuavide legi occidentalajn tekston — kion oni ne povus diri pri Esperanto aŭ Ido. (G. Waringhien en Literatura mondo 3/4.)

Statistiko pri mal-vortoj, farita de Dro W. J. A. Manders, konstatas, ke en „Fundamenta krestomatio“ oni renkontas meznombro unu mal-vorton inter 64 vortoj, en la „Rabeno de Baŝarafi“ (pli posta je dek jaroj almenaŭ) unu inter 50, en la „Teatra korbo“ de Baghy unu inter 116, kaj en „Preter la vivo“ unu inter 196 — rezulto despli rimarkinda, ke Baghy en 1933 publike metis sin

sur la flankon de la japanoj, kiam tiuj ekbatalis kontraŭ la neologismuloj. (Waringhien en Literatura mondo marto/aprilo.)

Pri la supersignitaj literoj venis de O. S. Magnússon dua cirkulero. En ĝi li proponas konservi el supersignitaj literoj la j kaj anstataŭ ŭ skribi simple u. Pri la ceteraj kvar literoj li restas ĉe sia propono ĉ = ch, ĝ = q, ĥ = x, ŝ = sh. Pastro John Kubacki en nova cirkulero denove asertas, ke ni, kiuj rekomendas resti ĉe la ĝisnuna ortografio, faras tion pro komercaj kialoj. Ne decas uzi paperon por refuti tiajn asertojn.

La tradukoj. Kvakeroj partoprenis en rekonstruo de Finnlando en tendaroj en la nordo de la lando. Ilia estrino diris en intervjuo de la finnlanda Radio-stacio laŭ la traduko de la interpretisto: „Ni trovis en Laponio multe da bona alkoholo.“ La estrino vere diris angle „good spirit“ (bona spirito). (Esperanta Finnlando, marto 1948.)

Somera tendaro de Esperanto-Instituto de Finnlando okazos la 3—12-an de julio 1948 en Somero. La kostoj: En komunloĝejo 60 svedaj kronoj, en privataj hejmoj 80 ĝis 100 svedaj kronoj. Adreso: Joel Vilkki, Somero, Finnlando.

Virinoj en Esperanto-movado estas artikolo de Julie Šupichová, aperinta ĉeflingve en la bulteno de la Hradec Králové-Klubo „Esperanto“ (dua numero). Ĝi donas nomaron de multaj virinoj, kiuj kunlaboris en la movado dum la sesdek jaroj pasintaj.

Mallonga vorta filmo de Dr. A. Pitlik pri 60 jaroj de Esperanto aperis en la „Esperanto“ de Hradec Králové. Ĝi trafte skizas la historion de la movado en la estaraj jaroj.

„Parolu irlande aŭ esperante!“ estas titolo de ĉeflingva artikolo de Jan Filip, en kiu li raportas pri siaj spertoj en Irlando, kie li havis prelegojn pri nia respubliko. Diris al li tiun peton s-o Oh Uiginn en Dublin ne volante, ke la ĉeestantoj ekparolu al lia trijara filo angle. „Kial estas humiligataj lingvoj de iuj nacioj“, demandas la aŭtoro, „pro tio, ke oni uzas en internacia kontakto lingvon de alia nacio ekskluzive pro tio, ke tiu alia nacio estas pli granda? Jen — unu el kaŭzoj de internaciaj konfuzoj kaj ĵaluzoj.“ („Esperanto“ en Hradec Králové, n-ro 2-a el aprilo.)

Tatra-ŝaŭmigilo, la pulvoro, el kiu vi facile, simple kaj tuj preparos bongustan, dolĉan, ŝaŭmetantan trinklimonadon. Fabrikas ĝin samideano Jaromír Pavlacký en Veselí n. Mor., kiel ni legas en bela anonco en „Esperanto“ el marto. Kontraŭ antaŭpaĝo de 15 respondkuponoj li liveras skatolon kun 35 porcioj en la tutan mondon. La kuraĝa samideano akceptu gratulon pro sia iniciato kaj deziron de ni al multaj sukcesoj en lia internacia komercado.

Rakonton de P. Pavlenko Mia samlandano Jusupov, tradukitan el la rusa de K. Stelov, ni legis kun ĝuo en Literatura mondo de marto-aprilo. Ceteraj noveloj en la kajero estas de Kresal, Marotta, Reisen. Poemoj estas de Petöfi (en tre eminenta traduko de Kalocsay), Mácha (el dua kanto de Majo en konate bona traduko de nia kunlaboranto Pumpr), Rylenkov (rusa poeto en traduko de Hilda Dresen). Precipe leginda estas detala raporto de Waringhien pri la Manders-libro „Kvin artlingvoj“. Mi nomus tiun metodon de raportado modela.

La hundo. Hundo kolerege bojis post foriranta veturilo. „Kial vi koleregas?“ diris al ĝi la bovino. „Tiu veturilo faris al vi nenian malbonon.“ — „Ĉu ĝi ne faras?“ respondas dentgrince la hundo. „Ĝi progresas kaj mi restas.“ — La envio ne lasas sin kaj ne lasas la aliajn esti feliĉaj. (Fáy András en Szalay-cirkulero.)

Bela esperanto-faldprospekto kun multaj ilustraĵoj pri la XI. festaro de la ĉeĥoslovaka gimnasta federacio Sokol ius aperis. Senpaĝe ricevebla ĉe la prepara komitato: Sletová kancelář, Praha I, Národní 3. Petu ĝin tie kaj dissendu al viaj amikoj en la eksterlando.

Germanio. Laŭ raporto de Germana Esperanto-Asocio ĝia membro-stato en komenco 1948 estis 6021. Pli ol duono troviĝas en la Usona zono. La plej grandaj lokaj grupoj estas en Munĥeno (ĉirkaŭ 1000) kaj en Hannover (ĉirkaŭ 500). Ekzistas 118 grupoj. La unua kongreso de unueca GEA okazos dum pentekosto en Munĥeno kaj tuj post la kongreso okazos internacia junular-kunveno esperantista en Alpoj, al kiu jam aliĝis centoj da junuloj el 10 landoj. Oficiala organo estas La Ponto, eldonata en

5000 ekz. „La estraro de GEA estas absolute kaj senkondiĉe kontraŭ-faŝista. Tri el niaj ses estraranoj suferis dum la Hitlera reĝimo en koncentrejo kaj kvara estis persekutita sed sukcesis fuĝi.“ (Laŭ „Esperanto“, marto.)

Internaciaj korespond-rondoj de Esperantistaj kluboj. Nia klubo en Teplice-Ŝanov serĉas kontakton kun 20 kluboj po unu el malsamaj landoj de la mondo. La ricevita leteroj estos legataj kaj diskutataj en la klubaj kunvenoj same kiel la respondoj, kiuj estos kolektive ellaboritaj de la tuta klubo. La celo estas havigi por la klubanoj interesan, instruan kaj vere internacian programon kaj havigi al la membroj senperan kontakton kun eksterlandaj samideanoj. La iniciatanta klubo promesas sendi al ĉiu partoprenanta klubo minimume unu leteron dum ĉiu du da monato. Tiun ĉi tre utilan kaj originalan proponon ni legas en „Esperanto“ marta kaj ni gratulas al la klubo kaj al versimila aŭtoro de la ideo samideano O. Skleněka, prokuristo de Živnostenská banka en Teplice-Ŝanov.

7-a Internacia Belga Artsemajno, 31. julio—8. aŭgusto 1948. Dum tiu semajno la belga Ministerio de Publika Instruado organizas por enlanda kaj eksterlanda publiko viziton sub kompetenta gvidado al la ĉefaj vidindaĵoj (laŭ antikva kaj moderna, arta kaj historia vidpunktoj) de la ĉefaj urboj en Belgio. La ses antaŭe okazintaj vizitoj garantias ĝian sukceson kaj intereson. — La tuta kostoprezo estas 3.455 belgaj frankoj (entenas 500 belgajn frankojn, kiujn vi ricevos kiel monon por persona uzo). Ĉio estas enkalkulita: bonegaj manĝoj, tre komfortaj hoteloj, belaj aŭtobusoj, ĉiuj enirprezoj, eĉ asekuro! Diversaj oficialaj akceptoj en la urboj estas sur la programo, kiu finiĝos en Brugge, proksime de la marbordo. La vizitoj okazos en malgrandaj grupetoj tiel, ke ĉiuj povos bone sekvi ĉion. Antaŭe oni diru, en kiu lingvo-grupo oni volas esti: nederlanda, franca aŭ angla. — Adreso por pliaj informoj: Prof. P. Montfort, Tervurenseleaan, 310, Woluwe, Brussel, Belgio.

Universitato de Chile anoncas programon de sia Somera lernejo. Inter la temoj aperas ankaŭ Enkonduko en la E-studon de René García kaj Ambrosio Rabanales. Por ni, loĝantoj de norda hemisfero, ŝajnas strange, ke someraj kursoj okazas inter la 2-a kaj 31-a de januaro, kiam ĉe ni frostas.

Bohemajn proverbojn laŭ traduko de d-ro Ant. Volkman el Plzeň, represas el Brazila Esperantisto, majo-junio 1911, nun post 37 jaroj la novembro numero de Rio Esperantista, aperanta en Rio de Janeiro. Tiu kajero alportas ankaŭ poemon de la ukraina Kotljarevskij La sonoĝo, tradukitan de nia samlandano F. V. Lorenz.

Slovaka kanto en greka E-gazeto. Helena Esperantisto, sept./okt. 1947, alportas la kanton La maljuna fraŭlo, kiu n. publikigis en nia 6/1947 numero.



Migrantan E-bibliotekon volas aranĝi Josef Eliáš, Kundratice 217, Krušné hory. Interesuloj skribu al li, aldonante pm. por respondo.



100 SVEDAJ KRONOJ

La 33-a Universala kongreso de Esperanto en Malmö decidis doni entute sumon de 100 svedaj kronoj kiel premio(j) al tiu(j) persono(j), kiu(j) ekster Svedujo aperigos la plej grandan kaj bonan artikolon pri Esperanto kaj la 33-a Universala

Kongreso en naciaj gazetoj kaj jurnaloj. La artikoloj estu rigarditaj nur el reklamvidpunkto. Kondiĉo estas, ke oni menciu la kongreson en Malmö. La gazetoj kun la esperanto-artikoloj devas atingi la Esperanto-Kongreson, Malmö, antaŭ 20/7 48 kun surskribita nomo kaj adreso de la artikoloaperiganto kaj informo pri la eldonnombro de la gazeto. Aro da artikoloj pli grandigos la ŝancojn.

33-a Universala Kongreso de Esperanto.



NUNI NANEV,

bulgara artkantisto, tenoro, estinta membro de opero en Sofia, loĝas nun en Olomouc kaj akceptas invitojn por koncertoj. Li estas konvinkita esperantisto, arde ligita kun nia ideo. La tekstojn de la kantoj li prezentas en tre diversaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Lia koncerto kun esperantlingvaj tekstoj estas artisma ĝuo kaj propaganda faro samtempe, ĉar lia kanto dokumentas kantoblon de Esperanto en tre konvinka maniero. Jen kelkaj kritikoj pri lia arto:

Nuni Nanev — majstro de bel canto. En la spegulĉambro de hotelo Passage okazigis la 24-an de februaro Esperantista Klubo en Brno koncert-vesperon de eminenta bulgara tenoristo Nuni Nanev, membro de la bulgara Nacia opero kun solludoj (unutoj) de komponisto kaj

RADIO-PRAHA

elsendas nun (laŭ mezeŭropa tempo normala):

Ĉiutage je la 16.30 per 25,51 m kaj 1935 m (15 minutojn).

Ĉiutage je la 22.00 per 31,41 m (15 min.).

Lunde kaj ĵaŭde je la 21.50 per 470 m (10 minutojn).

Verda Stacio ĉiun unuan lundon en la monato je la 22.00 per ondoj 325 m (100 kv stacio Morava) kaj 270 m (60 kv stacio Praha Du).

Por informoj pri aŭdebleco, por laŭdoj, kritikoj kaj proponoj dankas — Esperanto-servo de Radiostacio Praha XII, Stalin-strato 12.

Tutmonda korespondcentro. La membreco kostas kvar respondkuponojn. Ĉiu membro ricevas liston de korespondemuloj. — Loeckx Rt, Konijnenperken 109, Boschvoorde-Brussel.

Kongreso de SAT okazos la 31-an de julio — la 5-an de aŭgusto 1948 en Amsterdam. Ĝis mezo de marto aliĝis jam 227 gekamaradoj el 9 landoj. Al la honorkomitato aliĝis W. Drees, ministro por sociala prizorgo, kiu mem estas esperantisto, Dr. J. in t'Veld, ministro por rekonstruado, kaj eksĉefministro prof. Schermehorn.

kondukisto orkestra V. Scheiber. Tiu ĉi vespero de arioj kaj kantoj fariĝis granda kaj agrabla surprizo por multaj aŭskultantoj, kiujn tiu ĉi, ĉe ni ankoraŭ nesufiĉe konata tenoro, apartenanta sendube inter la plej bonajn, sukcesis refoje entuziasmigi... Oni devas konстати, ke Esperanto, en kiu estis kantata plej granda parto de la programo, distingigis per belsoneco, rememoriganta agrablecon de la itala. Ĝi sonas bele ĉe Nanev same kiel lia ruslingvo kaj lia gepatra lingvo kaj la itala, hispana. (Ĉin, 27. II. 1948.)

Sub la protekto de la bulgara ministro kaj ambasadoro en ĈSR Stefano Simov aranĝis Esperantista societo en Olomouc okaze de la 60-jara jubileo de Esperanto koncerton de s-ro Nuni Nanev, unu el la plej gravaj kulturaj reprezentantoj de la frata Bulgarujo. La kara gasto pruvis, ke li plene meritas la famon, kiu lin antaŭiras. Lia eminenta voĉo, piĉa precizeco, eĉ en la altaj pozicioj, zorgema artikulado envicigas lin inter la eminentajn mondtenorojn. Aparta estas forto de lia voĉo, kiu sonas egalcerte kaj precize, ne perdante ion el sia intenseco eĉ en la plej forta fortisimo, eĉ en la plej mallaŭta pianisimo, kie lia intenseco atingas kultivecon. Facilaj transiroj, arta travivo de la muzika esprimo, speciale en la partoj lirike-dramecaj kaj profunda muzika instinkto kreas neelĉerpeblan artfondaĵon, el kiu tiu ĉi simpatia artisto al sia aŭdantaro tiom riĉe disdonas. En siaj tiufoje tre varian programon li envicigis komponaĵojn de la pli fruaj aŭtoroj (16-a jarcento), kaj pli junajn (19-a kaj 20-a jarcento) kaj popolkantojn. Kelkajn programerojn li kantis esperante, du ĉeĉe, la ceterajn ruse, bulgare kaj itale. (Stráž lidu 7. X. 1947.)

Nuni Nanev kaptis la aŭdantaron per sia efektive eksterordinare facile movebla tenoro... plene agordita en ĉiuj voĉpozicioj... la tekniko de senfina spiro estas unu el la kondiĉoj por liaj artistaj sukcesoj... kantis trionon de sia programo en Esperanto, kie li montris la belecon de tiu ĉi lingvo... brua aplaŭdado... (Ĉin, 8. X. 1947.)

...speciale kulturita voĉo, kiu ravas kaj trankviligas per neinterrompita ĝuo... eksterordinara estas lia dolĉa kaj kristala pianisimo... pruvis, ke Esperanto taŭgas por kanto kiel la lingvo itala. (Volné slovo 8. X. 1947.)

...la unuan fojon oni uzis dum artista prezentado ankaŭ la internacian lingvon Esperanton... majstro Nuni Nanev per sia sabata prezentado montris, ke la famo, kiu lin antaŭiris, estis plene meritita... en lia eminenta voĉfondaĵo, piĉa certeco, eĉ zorgema artikulado, oni ekkonis tenoron de efektive eksterordinara perfekteco... (Ĉeskoslovenská demokracie, 14. X. 1947.)

BELGA ESPERANTISTA TURISTA SERVO: Estimataj samideanoj, petu: 1. Senpage turistajn broŝurojn kun vindindaĵoj, planoj ktp. pri belgaj urboj. — 2. Okaze de vojaĝo loĝejon en belgaj esperantistaj hoteloj aŭ ĉe samideanoj (kontraŭ kompenso). — 3. Gvidadon pere de samideanoj. — 4. Reciprokan gastigadon. — Aldonu al via peto unu respondkuponojn. Bonvolu komuniki la enhavon al lokaj gazetoj kaj al oficialaj kaj neoficialaj turistaj instancoj. — Loeckx Rt, Konijnenperken 109, Boschvoorde-Brussel.

Devo de ĉiu serioza esperantisto estas
aboni la reprezentan revuon

LITERATURA MONDO

Kolekto de plej valoraj literaturajoj,
aperantaj en nia lingvo.

Kunlaboras niaj unuaj poetoj kaj verkistoj.

Sendu tuj vian abonpagon Kĉs 150.—
al Libro vendejo de EAĈSR
(pŝp kto nro 12.371).

ESPERANTO V CIZINĚ

Holandský ministr pro rekonstrukci dr. J. in t'Veld o esperantu. V esperantském týdnu v září 1947 v Zaandamu pravil nynější ministr vítaje účastníky jako starosta města: »Mohu říci, že praktické setkání s esperantem bylo pro mne zkušeností zcela nečekanou a unášející. Před nedávnem jsem se zúčastnil mezinárodního sjezdu v Paříži, kde se mluvilo jen francouzsky a anglicky. Pro ustavičné překládání a z toho plynoucí nedorozumění byl sjezd zdoluhavý a pro účastníky nudný. Proto mne velice překvapilo, když jsem během deseti dnů osobně mohl konstatovat, jak lidé, příšedší z deseti zemí, ve schůzích i na ulici tak snadno a plyně se dorozumívali esperantem. Byl jsem ještě více překvapen zjištěním, že většina z nich, až na malé výjimky, znala vedle své mateřštiny jen esperanto a že absolvovala jen základní školu. Konstatoval jsem libozvučnost a snadnost esperanta. Sám jsem četl v esperantu pozdravný proslov a všichni esperantisté mi plně rozuměli. Osobně jsem se přesvědčil, že je to zcela nemožné pro francouzštinu, angličtinu nebo jiný jazyk.«

Na dotaz o zavedení esperanta do škol J. in t'Veld řekl:

»Příslušný ministr se již o věci zmínil. Jako člen parlamentu jistě dám podnět ke konkrétním zásahům... Esperanto zasluhuje pozornosti od každého. Tímto snadným jazykem mohou si lidé snadno dopisovat a potom se navštěvovat a proto esperantské hnutí velmi přispívá k mezinárodnímu míru, tak žhavě žádanému.«

Z ministrova projevu zvláště si ceníme jeho zjištění, jak lze srozumitelně čísti esperanto hned napoprvé bez učení. Tato důležitá fonetická vlastnost esperanta nebývá dosti zdůrazňována, ač je to jedna z jeho velkých předností. Svědčí to o neobyčejně bystrém postřehu doktora Velda. Gratulujeme Holanďanům k jejich ministroví.

Přednáška v Záhřebu o Čs. rozhlasu. Po druhém Československém večeru, uspořádaném v lednu esperantskou společností Bude Borjan v Záhřebu za účasti čs. konsula dr. Brtníka, stálý posluchač esperantského rozhlasu z Prahy p. Marinko Gjiwoje proslovil zajímavou přednášku o Čs. rozhlasu u příležitosti 25. výročí jeho trvání. Přednáška se konala v místnostech spol. Bude Borjan dne 12. března t. r. ve formě rozhovoru, v němž p. Gjiwoje podal přehled o vývoji našeho rozhlasu i o jeho nynějším stavu se zvláštním zřetelem k jeho esperantskému odboru. Materiál čerpal jednak z esperantské publikace Čs. rozhlasu »Almanako de la Verda stacio«, jednak si vyžádal další informace u esperantského odboru našeho rozhlasu. (jm)

Paříž. U příležitosti úmrtí čs. ministra zahraničí Jana Masaryka věnoval pařížský rozhlas 12. března t. r. své esperantské vysílání Československu pod názvem: »Věnujme tento večer

Československu«. Přednášející pravil m. j.: Francouzové jsou opravdu účastní na smutku československého lidu, neboť Čechoslováci jsou nám téměř bratry, jak napsal jeden francouzský list. — Další část relace byla věnována prezidentům Masarykovi a Benešovi, bývalým pařížským studentům. Závěrem byla zahrána druhá věta Janáčkovy suity. (jm)

Zkušební komise svazu bude zasedati v Doksech v sobotu 31. července a v neděli 1. srpna. Pro kandidáty zkoušky o jazykové znalosti esperanta je znamenitou přípravou kurs B nebo C. Pro kandidáty zkoušky o způsobilosti vyučovat esperantu je pomůckou absolvování kursu D (semináře). Podmínkou ke skládání této zkoušky je však schválení domácí práce, již musí dostat komise do 30. června. Prosíme proto zájemce, kteří se chtějí podrobiti v Doksech vyšší zkoušce, aby se přihlásili už v květnu nebo v červnu, aby mohli dostati themata domácí práce a aby ji mohli do konce června předložit. Ke zkoušce v Doksech mohou se ovšem dostavit i ti kandidáti, kteří už mají domácí práci schválenou nebo kteří už thema dostali a včas je předloží k schválení, i když se kursů neúčastní. Přihlášky přijímá jednatel komise JUDr. Tomáš Pumpr v Praze XIX, Verdunská 8.

III. letní škola esperanta V DOKSECH U MÁCHOVA JEZERA 17.—31. července 1948.

IV. zpráva:

Komitét L. š. E. uspořádá pro přátele esperanta — pod záštitou místního národního výboru a v rámci propagačních zařízení letoviska Doks u Máchova jezera — od 17. do 31. července t. r. řadu esperantských kursů a společenských podniků, o nichž podrobné zprávy uveřejněny byly již v předešlých číslech časopisu »Esperantista«. — Oznamte, kterého kursu miníte se účastniti (A: pro začátečníky, B: pokračovací, C: konverzační, D: esperantský seminář pro znalé esperanta, činovníky a učitele).

Vyučování ve škole a pod širým nebem od 8.30 hod. do 12.30 hod.

Při omezení hotelových lůžek nemůže »škola« zaručiti hotelové ubytování. Ubytování v soukromí prostřednictvím »školy« počíná ve 12 hod. 17. VII. a končí 31. VII. o 12. hod. Pokusíme se o obstarání společného stravování.

Školné včetně vstupu do společenských podniků »školy« pořádaných a ubytovného činí 750 Kčs, režijní příspěvek letních esperantských hostů, opravňující k účasti na zábavních podnicích, 75 Kčs. Jízda výletními autokary platí se zvláště.

Propagační prospekt vyjde v květnu. — Seznamovací večírek žáků a letních esperantských hostů koná se 17. července o 21. hod. »U jelena«. — Po dobu kursů bude věstník »Verda voĉo« vycházeti denně. — Komitét věnoval Spolku divadelních ochotníků »K. H. Mácha« v Doksech za loňské namáhavé a úspěšné provedení esperantského představení veselohry »Noc na Karlštejně« diplom, jež malovala naše začka pí Eva Rašková.

Přihlášky žactva (do konce června) přijímá jednatel p. K. Šolc, Mladá Boleslav I, 41, školné spořitelna v Doksech (složenkou č. 66.421 s poznámkou L. š. E.). Přihlaste se s urychlením, počet účastníků omezen! — Přečtěte si předešlé zprávy! — Na shledanou v Doksech!

KOMITÉT »LETNÍ ŠKOLY ESPERANTA« V DOKSECH